


Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religi-kompara revuo

Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

**ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**

Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UEA, ŬEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj). **Membro de WCRP** (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita membro de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).

## Iniciativo por *Unuiĝinta Religiaro*



Ne nur cerbumi por la paco, sed jam realigi ĝin en ĝojo : s-ro Umeda ĉe la UR-konferenco.



Ekster la UR-kongresejo en Stanford Universitato, 23/27 junio 1997 : ne nur religiaj flagoj...

## Vorto de la redaktoro

Anstataŭ la tradiciaj bondeziroj de la (jam ne plu tute) nova jaro, bonvolu legi sur la apuda paĝo la belan revon de la Nobel-pacpremiitoj, kaj agi...

Ankaŭ subskribindas la **Deklaro de Subteno** al la Iniciato por Unuiĝinta Religiaro (p. 21), pleningante ĝin laŭeble en la angla (por ke ili povu pli facile kompreni viajn ideojn), en via nacia lingvo aŭ en esperanto se vi preferas tion. Sed almenaŭ ne forgesu, inter viaj revoj, menci la proponon uzi esperanton en la UR pro egaleco kaj respekto al ĉiu.

Mi **invitas vin en Balagué** post la Universala Kongreso, laŭ propono de nia kasisto Bradio Moro okazigi tie "Taoisman postkongres(et)on": mi preferas interreligian, sed laŭ *Taopincipo*: spontanea.

Fine, al tiuj kiuj al kutimiĝis trovi **personan** manskribitan **mesaĝeton de mi**, mi devas bedaŭrinde anonci ke la poŝtaj reguloj (kiuj rajtigas favorajn prezojn al registritaj gazetoj) fariĝis pli rigoraj ekde januaro: do ne plu eblas. Tamen: **saluton!**

N.B. **Bonvolu laŭeble sendi viajn artikolojn** ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj: *Word Perfect...*) sur disketoj (3 1/2), plie de la surpapera kurtima formo: tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon. **Mi ankaŭ povas ricevi ilin fakse aŭ modeme.**

**Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritaĵoj kaj teologiaj instruoj)** ĉ. trimonata

**Red.:** Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

**ASISTI-estraro:** Prez. Y. Umeda – B. Moro: kasisto – Ch. Lavarenne: sekr. kaj vickasisto – **Jeremi Gishron** (Centro Sivron, Box 231 80, IL-91 231 Jerusalem, Faks.: +972 2 532 26 15): kunvenoj – F. Degoul: eksteraj rilatoj – Leif Nordenstorm: Religia Antologio.

**Directeur de Publication:** Christian Lavarenne

**Jarabono:** triono de UEA-indivdua abono (MA), t.e. 105ff / 34gld / 30DM / 20\$ (duonpreze por malriĉaj l.) al:

– franca poŝtkonto *Asistilo*, n-ro 1042177R Marseille  
– UEA-konto asis-r  
– FEL-konto clvr-n  
– Marek Krainski, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan  
– aŭ B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

**Subtena abono:** ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$...

**Abonhelpa fonduso:** pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

**ASISTI-kotizo 1997:** deviga por esti membro, knuajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ: 10 gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

**Subtena membro:** ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...Ne forgesu kontribui, koran dankon!

## Enhavo

Pacon! Alvoko de 20 Nobel-premiitoj, el kiuj la Dalai-Lamao kaj † Patrino Tereza	p. 3
Iniciato por Unuiĝinta Religiaro, kaj reaga letero de Karel Kroft (CZ)	p. 3
(Pro la venonta UK, Gaskona poezio :) <i>Ont es?</i> , de Danis Saurat (Okcitanio)	p. 4
Kataroj: la "Bonaj Kristanoj" (kun traduko el <i>Femmes cathares</i> de Anne Brenon, F)	p. 5
Morto de 16-jara tibeta monaĥo kaj kvin geinfanoj apud Everest (Nepalo)	p. 6
Prepare al ISE-vizito en <i>Neve Šalom</i> : intervuo kun Anne Le Meignen (Israelo)	p. 8
<b>4-a Interreligia Seminario Esperantista</b> , en Jerusalemo: "dua bulteno"	p. 10
Religiaj renkontiĝoj: ekumena (Nantes), IARF (Bad Boll, D), tuja! (Karlovo, BG)	p. 10
<b>Mesaĝo al teologoj</b> (profesiaj aŭ ne), de Philippe Cousson (F)	p. 10
<i>La Serio pri Gilgameŝ, Tria tabuleto</i> (Malnovaj kaj Nineva versioj, II-a jarmilo a.K.)	p. 11
<i>La Serĉado de l'Gralo</i> : Iu misterplena abatejo... (el la romanika, XIII-a jc)	p. 16
El la Prologo de "nia sankta Di-portanta Patro Petro la Damaskano" (XI-a jc.)	p. 18
Daŭrigita dialogo pri "Supereco de religio?", Eric Coffinet, Armando Zecchin (I)	p. 20
<i>Dio, la ununura Mi</i> , de Sŭamio Abhiŝiktnanda (F / Bharato)	p. 21
<b>Subskribinda Deklaro de Subteno</b> al la Iniciato por Unuiĝinta Religiaro (USA)	p. 21
<i>Jogosutro</i> de Patanĝali, kun komentario de Vjaso (Bharato)	p. 22
Raporto pri kelkaj religiaj aranĝoj de la <b>lasta UK</b> , de Paul Desailly (Aŭstralio)	p. 28
<b>Leteroj</b> : A.X. Casanova Domingo (ES), frato Ludovic (pri <i>Alliance Universelle</i> , F),	p. 29
David Featherstone (GB) (al A. Guadarrama Corrales, Kubo), Bojidar Leonov (BG)	p. 29
<i>Granda Unueca Kredo</i> (fino de la <i>Enkonduko</i> ), de Jebumo (Ĉinio)	p. 30
<b>Letero pri Asocio de Spirita Esplorado de Antalya</b> , de Levent Ünver (Turkio)	p. 30
Anoncoj: <b>Sufioj</b> , <i>Spiritaj mesaĝoj</i> , <i>La Kancerkliniko</i> , kaj <i>Kosmologi-kursoj</i> (DK)	p. 31
Ni ricevis: religiaj kaj spiritaĵaj <b>libroj</b> , broŝuroj kaj novaj gazetoj	p. 32

## Pacon !

*Ni ĉiam memoru pri bon' de l'homaro  
Al frata la celo ni iru obstine  
Antaŭen kun pacaj armiloj !* "(Zamenhof)

**Revo de la Nobel-pacpremiitoj : la tria jarmilo komenciĝu "sub la sankta signo de ...la Paco".**



" Por kontraŭstari al la perforto, ekzistas ununura rimedo : la edukado. La estonto de la mondo dependas de nia volo reale ŝanĝi, nia volo **ĉesigi la kulturon de perforto**, kaj fizikan, kaj psikologian, kaj ekonomian.

### **Ni eduku niajn infanojn por ke ili helpu nin plisaĝiĝi**

Niaj pensmanieroj estas arkaikaj, ni daŭrigas eduki niajn infanojn laŭ kulturoj hereditaj el la tempo de konkeraj militoj. Ni devas forlasi kelkajn malaktualajn principojn kaj instrui al niaj infanoj ke la aliulo ne estas malamiko ; aŭdaci diri al la junularo, ĝis en la prihistoriaj lernolibroj, ke **pli utile por la mondo estas digne vivi ol heroe morti** ; ke tio estas la **konscienco, pli ol obeado**, kiu **fundamentas la sencon de la homa vivo**.

La ununura vera defio, hodiaŭ, la veto de kie dependas kia estos la estonto, estas sukcesi, por la unua fojo, vivi ĉiuj kune en la respekto de si mem, de la aliuloj kaj de la natura medio (...)

Por lumigi esperon, ni volas adoptigi ĉe UNO, de la registaroj de ĉiuj landoj de la mondo, rezolucion kiu deklaras la jaron 2000 *jaro de edukado al la malperforto*, kaj la jarojn 2000 ĝis 2010 *jardeko por kulturo de malperforto*, **por ke la malperforto finfine estu instruata.** "

Por ke tiu revo "*por eterna ben' efektiviĝu*", ankaŭ vi sendu al la red. kun tre legeblaj nomo k adr. : "*M subskribas kaj subtenas la alvokon por ke la jaro 2000 estu deklarita jaro (...) finfine estu instruata.*"

## Iniciato por *Unuiĝinta Religiaro*

Plie de la Monda Konferenco pri UR-Iniciato (kiun ĉeestis la patriako de la Kamboĝaj Budhanoj) en junio 1997, jam okazadas regionaj konferencoj : en Britio (Oksfordo), Usono (Novjorko, Los-Anĝeleso, Vaŝingtono), Argentino (Buenos-Ajreso), Venezuelo, Sud-Afriko, Kenjo, Egiptio, Bharato, Nov-Zelando... Tria Monda Konferenco en junio 1998.

La UR-Iniciato i.a. **alvokas al subskribo de Deklaro de Subteno** (vidu p. 21), kreado de "Interkredaj Pacejoj", kaj dediĉo de 24 horoj al malperforto, la 31-an de decembro 1999.

### Reagoj

La enhavo de *Asistilo* n-ro 20 plene kongruas kun mia dejunaĝa aspirado (...) Min tuŝis precipe la ideoj de Baba Virsa Singh. Lia dubo pri la valoro de klopodoj unuigi religianojn fontas el lia firma apogo al dharmo. Mi gratulas lin. Li saturiĝas de dharmo ; mi, kiu bezonas lambastonojn, mi saturiĝas de la kalejdoskopa enhavo de *Asistilo* (...)

Mi kun mia filo, kiu estas laŭleĝa posedanto, emas ludoni por simbola prezo kelkajn milojn da kvadrataj metroj al ekologia aŭ humanisma organizo, prefere ol disponigi ilin al moncela firmao...

**Karel Kraft, CZ**

– *Kaj kial ne, do, al esperantista ...aŭ interreligia ?*

*En Srilanko homo eklegis en trajno broŝuron pri UR-Iniciato. Apuda pasaĝero petis la adreson.*

Kristano, mi enamiĝis al budhana virino. En Srilanko budhanoj kaj kristanoj konvencie malamas unuj la aliajn. Niaj parencoj tiom aktive kontraŭstaris nian geedziĝon ke ili provis veneni nin.

Sed ni pluvivis kaj daŭrigis nian planon. Dum la geedziĝfestoj ekestis incendio. Tri homoj mortis. (...) Tiun tagon mi dediĉis mian vivon al laboro por io kiel la Unuiĝinta Religiaro. Tio okazis antaŭ 8 jaroj kaj nun ni estas 1.400. Ni estas mone malriĉaj sed havas grandan spiriton kaj estas viaj.

**En prafundamento de buntaj kulturaj sferoj kaj religiaj mondoj, ekzistas la samaj moralaj principoj, ofertantaj ŝlosilon al tuthomara kunvivado sur nia planedo Tero (...)**

Se ni ne volas ke la estonteco de la homaro estu minacata per konfliktoj inter unuopaj civilizacioj kaj kulturaj sferoj, ni havas ununuran eblecon : serĉi unuecon en ilia multeco. En tio mi vidas la solan eblan fonton de novaj spirito kaj etiko por la tuthomara kunlaboro, eĉ renovigitan, **spiritan fundamenton por plua, sencoplana UN-ekzisto.**"  
**Ĉeĥa prez. Václav Havel**

Jam la usona prezidanto Roosevelt (1882-1945) revis pri Organizo de la Unuiĝintaj Religioj, prezidata de la Papo ! (P. Gerbet, *Les organ. intern.*, PUF)

# Okcitanio : gaskona poezio

La venonta U.K. okazos en Okcitanio. Jen do "teologia dialogo" de nuntempa arieĝa poeto en sud-okcidenta dialekto de la okcitana ; tradukita el la Antologio de la religia okcitana poezio kompilita en 1972 de la katolika pastro Joan Larzac. (Toulouse, Privat, p. 145-147.)

## Ont es ?

*La maire :*

E tu que creses ?  
Es al cèl ?  
Es al trauc ?  
Ont es ?

*Lo gojat :*

Jo cresi que qualche res dura encar  
Quand es mòrt  
Quand sos uèlhs tornavan èstre clars  
Era'l medeish  
Parlava coma abans  
Aviá sa coneissença  
Fins a la fin èra ací tot entièr  
Quand se n'es anat se n'es anat tot entièr.

*La maire :*

Oc, e l'èi vist tanben  
Mas alavetz, ont es ?

*Lo gojat :*

Aquò, ac apèlan Dieu  
Dins ton esperit tot çò qu'as vist dura  
T'en brembas e t'en brembas pas  
Mas i es  
E pòt te tornar.  
Se res demorava auriás pas cap d'esperit.

*La maire :*

Es vertat - de tot me brembi.

*Lo gojat :*

Dieu es aquel que se bremba de tot  
De nosautris  
Tot çò qu'èra de la naishença a la mòrt  
Se demòra tot dins l'esperit de Dieu  
Quand te moriràs trobaràs tot.  
Tot çò qu'as vist e as avust d'el, lo mòrt,  
desempùei los temps,  
Dieu se bremba de tot ;  
e quand morèm, èm Dieu.

*La maire :*

Te creses pas que tot malaurós  
Dura  
Endacòm mai ?

*Lo gojat :*

Que non ; es amb Dieu es pas endacòm mai  
Tot çò qu'èra,  
Tot çò qu'a fèit, tot çò qu'a pensat  
De tota la vida.

## Kie estas li ?

*La patrino* Kaj vi, kion kredas vi ?  
Ĉu li estas en ĉielo ?  
Ĉu li estas en la truo ?  
Kie, kie estas li ?

*La filo* Kredas mi ke io daŭras.  
Kiam estis li mortanta  
kaj okuloj reklariĝis,  
tute estis li la sama,  
li parolis tute same ;  
ĝis la fin' konscio restis,  
li kompleta estis tie :  
kiam fine li foriris  
li foriris tutkompleta.

*La patrino* Ankaŭ mi ja vidis tion.  
Sed do, kie estas li ?

*La filo* Tion oni nomas Dio.  
En spirito via, ĉio  
daŭras, kion vidis vi :  
vi memoras, ne memoras,  
sed ĝi ĉiam estas tie  
kaj reveni al vi povas.  
Se nenio iam restus,  
eĉ ne havus ni spiriton.

*La partino* Veras ! Ĉion mi memoras.

*La filo* Dio estas tiu kiu  
ĉion, ankaŭ nin, memoras.  
Kio estas de l' naskiĝo  
ĝis la morto, ĉio restas  
en spirito Lia, dia.  
Kiam mortos, vi retrovos  
ĉion kion vidis vi,  
kion de li, la mortinto,  
vi ricevis. Ekde ĉiam  
Dio ĉion memoradas :  
ni, mortante, estos Di'.

*La patrino* Sed ĉu vi ne kredas ke plu  
daŭras, ie, malfeliĉoj ?

*La filo* Tute ne, ĉar ili estas  
nur "en Dio" : ne plu "ie" ;  
kiel ĉio kio estis,  
kion ajn vi iam faris,  
kion ajn vi iam pensis  
dum la tuta via vivo.

*La maire :*

Ac compreni tot  
Lo mal tanben qu'avèm fèit :  
es l'infèrn  
Lo bonur qu'avèm fèit  
es lo paradís  
E se nos èm perdonats l'un l'autre ?

*Lo gojat :*

Fè doç lo quite remembre del mal.

*La maire :*

Oc, qualche res demòra  
Dieu quand neishèm fè venir qualqu'un  
ont i aviá pas res  
Es plus aisit que garde existint  
çò qu'a existit  
E qu'ac volèm  
Garda tot  
Cal ben que sia lo bon Dieu  
o i auriá pas res  
Se res demorava pas i auriá pas jamès res  
E se i a quelques res  
i a Dieu qu'a tot fèit.

**Danis Saurat**

*La patrino* Jes, mi nun komprenas çion :  
la malbono kiun faris  
ni, fariĝas la infero,  
kaj la bon', la paradizo.  
Kaj se unu la alian  
ni pardonis tutakore ?

*La filo* Nu, pro tio la memor' mem  
de l'malbono iĝas dolça.

*La patrino* Jes ja, certe, io restas.  
Dio, kiam ni naskiĝis,  
nin estigis kie estis  
ja nenio ; pli facilas  
gardi plue ekzistanta  
tion kio jam ekzistis.  
Tion volas kaj decidas  
ni : ke Dio çion gardas.  
*Devas esti Bona Dio ;*  
se ne, estus ja nenio.  
Se nenio restus, tiam  
estus ja neniam io.  
Kaj se estas io, estas  
Dio, kiu çion faris.

**Denizo Saŭrat**

## Kataroj : la "Bonaj Kristanoj"

La kataroj evidente estis kristanoj ; sed kelkfoje eĉ evidentajoj bezonas pruvon. Tia estas la kazo pri kataroj ĉar A. Cherpillod, en la februara numero de *Esperanto*, starigis la demandon kaj eĉ asertis ke "sen ia hezito oni povas respondi : ne".

Do ankaŭ mi devas starigi demandon : ĉu "la kataroj nomis sin mem kristanoj" kiel rekonite de li, *nur ĉar* "tiutempe la nomo nekristano signifis proksimume "pagano, malpiulo, nekredanto, sovaĝulo" ? Certe ne, ĉar ili eĉ sentis la bezonon precizigi ke ili estas "bonaj kristanoj", "veraj kristanoj", vidante ke multaj tiamaj "katolikoj" fakte estis malpiuloj kaj kvazaŭpaganoj.

La du ĉefaj preĝoj de la kataroj estis *Patronia*, la preĝo instruita de Jesuo al liaj disĉiploj, kaj *Adoremus* : "Ni adoru la Patron kaj la Filon kaj la Sanktan Spiriton". Kaj krom, tute margene, kelkaj apokrifaj kristanaj tekstoj, ili "ĉerpis sian instruadon kaj sian propran viv[manier]on el la nuraj kristanaj Skriboj (...) La kataroj, probable devenantaj (...) el la unuaj jarcentoj de la Eklezio, estis kristanoj antaŭ ol esti dualistoj".

Kaj ĉefe la kataroj neniam akceptis mensogi, eĉ se tia nemensogado devis konduki ilin ĝis la morto sur ŝtiparo : do ili certe vere kredis ke ili estas kristanoj kiam ili tion diris.


### La "Veraj Kristanoj"

"Ĉe la koro de la mezepoka kristanejo, kaj el la inspiraj fontoj mem de la mezepoka kristana kulturo, la katarismo estigis modelojn de kristanoj malsamaj, tipoj de gehomoj obeantaj ne plu tute al la samaj normoj, al la samaj devoj, al la samaj logikeroj ; sed tamen perfekte kristanaj kaj perfekte mezepokaj (...) La ritaro de la kataroj, ilia predikado, ilia regulo kaj ilia vesto faras ilin religiuloj vivantaj meze de la profana mondo.

(...) La tre antikva tradicio de interpretado de la Skriboj, kiun ili ankoraŭ transmisias ĉe la koro mem de la mezepoko, donas al ili malsaman rigardon al la mondo, al la homo, al la perspektivoj de Saviĝo.

Ili sin difinas mem kiel la Eklezion de la veraj kristanoj, la ununuran Eklezion kiu estas rekta kaj aŭtenta depongardanto de la mesaĝo kaj de la tradicio de la Kristo kaj de liaj Apostoloj. Ili asertas ke Dio, la Dio de Amo anoncita de la Kristo kaj de lia Bona Novaĝo, neniam povis voli nek uzi la malbonon ; ke estas nenia sufero, nek ia perforto kiu povas trovi pravigon sub la rigardo de la Patro sankta ; ke la malbono, ke la morto ĉiam estas skandalo." (A. Brenon, *Femmes cathares*, 1992, p. 80)

**Christian Lavarenne**



# Morto de 16-jara tibeta monaĥo kaj kvin geinfanoj apud Everest

Grupo de 22 tibetaj fuĝantoj (el kiuj 7 virinoj) paŝis dum tri semajnoj tra preskaŭ 1.000 kilometroj da neĝaj montoj por eskapi el sia invadita lando: plejparto el la plenkreskuloj por eniri tibetbudhistajn monaĥejojn aŭ monaĥinejojn en Bharato, kaj la geinfanoj por ricevi tradicionan tibetan edukon en Dharamsala, la ekzilejo de la Dalai-Lamao.

(Multaj tibetanoj kredas ke nur forlasante sian landon la infanoj povos lerni la tibetan lingvon kaj kulturon.)

Sed la 3-an de decembro, 100 kilometrojn okcidente de Ĉomolangma (la monto Everesto), tritaga neĝtempesto kaptis ilin ĵus antaŭ ol ili atingos *Nangpa-la*, la 5.700-metrojn altan trapasejon al Nepalo. La grupo tute ne povis daŭrigi dum la tri tagoj de tempestego. La 4-an tagon ili komencis paŝi tra la freŝa neĝo, pli ol unu-metron alta, foje kaj denove dronante en ĝi ĝis la brusto.

La 9-an de decembro, post unu tago kaj duono da tia baraktado, Ka-lo, 10-jara knabo, kaj Ŝilok, samaĝa knabino, mortis pro malsato kaj malvarmo. La 11-jara fratino de Ŝilok, Phurbu Drölma, ankaŭ mortis tiun tagon. La korpoj de la tri infanoj estis envolvataj en kovrilojn, kaj forlasataj en la montaro. La 10-an de decembro, tri tagojn post sia malsuprenirado de la trapasejo, la grupo atingis nepalan dometaron, tro malfrue por savi kvaran infanon, 11-jaran knabinon nomitan Drölma, kiu mortis je la 1-a kaj duono de tiu posttagmezo.

La 16-jara monaĥo, Sönam Taŝi, mortis la 15-an de decembro dum aliaj membroj de la grupo portis lin de la vilaĝeto Khari-Khola, 20 km sude de Namĉhe Bazar, al lokala hospitalo. Lia korpo estis kremaciata apud Nanthala, vilaĝo kie li mortis.

## Bonsanca renkonto

Du ge-Skotoj, kiuj feris de du monatoj en Nepalo, poste helpis ilin: *"La vetero malebligis realigi niajn piedmigradajn planojn, ni do trudate revenis direkten al Katmanduo kiam ni unue vidis la grupon"*, diris Stuart Findlay, 36-jara.

*"Dum ni trinkis teon en kafejeto, tibeta junulino venis kaj sidiĝis apud ni"*, li rakontas. *"Ŝi demetis siajn ŝuojn kaj montris al ni siajn piedojn, kiuj estis grave frostvunditaj."* Lia 32-jara kunulino Claire McNaughton aldonis: *"Ni ekkonsciis ke se ŝi ne ricevos medicinan helpon, ŝi havos gravajn problemojn pro gangreno"*.

– *"Kiam la aliaj alvenis ni vidis ke kelkaj estis en ankoraŭ pli malbonfarto ol ŝi."*

*"Ili jam marŝis dum tri semajnoj, malmulte vestitaj, kaj havis nur tenisŝuojn. Ili estis ĉe la limo de morto, kaj mi opinias ke ili konsciis tion. Ni malkovris ke ili eskapis el Lhasao, la ĉefurbo de Tibeto, antaŭ tri semajnoj, kaj celis Katmanduon, kie tibetaj ekzilitoj devis zorgi pri ili. Kutime temas pri rapida vojaĝo, sed la dika neĝo malfaciligis ilian marŝon. Ili estis nepreparitaj por la severaj kondiĉoj."*

– *"Ili ankoraŭ marŝis sed la plejparto lamis; iliaj nuraj posedaĵoj estis la vestoj volvitaj ĉirkaŭ ili, kaj ili havis nur leĝerajn ŝuojn."*

## Komprenebla timo

La rifuĝantoj ne volis altiri sur sin la atenton de la Nepalaj aŭtoritatoj. Ili timegis esti repelataj al la Ĉinoj ĉar ili diris ke ili riskus torturon kaj eventualan mortigon. Kvankam ekde 1995, kiam la komunistoj perdis la povon en Nepalo, ne plu estas ordonite al la polico transdoni la kaptitajn tibetajn rifuĝantojn al la ĉinaj limgardistoj, tio fojfoje ankoraŭ okazas. Ofte Nepalaj policistoj aŭ limgardistoj minace postulas *bakŝis*-ojn ("donaĵojn", t.e. subaĉetadon), kaj en novembro tia rekonduko al la landlimo okazis al 11 tibetanoj kiuj rifuzis kaŝe pagi 20.000 rupioj (ĉ. 2.500 gld).

Tamen kreskanta nombro de ĵusaj raportoj pri skribas la Nepalajn policojn kiel kunlaboreman.

## Admirindaj Samaritanoj

– *"Ili estis terurigitaj. Ni ne povis simple forlasi ilin. Ni ne pensis pri la danĝero, ni nur sciis ke ni devas helpi."*

– *"Ni decidis ke ni devis [unue] helpi du el tiuj kiuj plej suferis."*

Ignorante konsilon de aliaj okcidentaj piedmigrantoj ne enmiksiĝi, ili dungis kvar virojn por porti la 23-jaran monaĥinon al la hospitalo fondita de Sir Edmund Hillary en Khunde apud Namĉhe Bazar. Kaj Stuart portis mem en siaj brakoj 11-jaran knabinon, la ununuran infanon kiu postvivis. Ili paŝis dum naŭ horoj, altitude suprengrimante 1.000 metrojn entute. *"Tio helpis, ke mi estas montgrimpisto kaj konis la regionon, sed reale ni lernis dum ni marŝis."*

Kiam ili atingis la hospitalon, kie la du vunditoj estis tuj prizorgataj, Stuart kaj Claire kontaktiĝis kun reprezentantoj de la UNa Alta Komisararo por la Rifuĝintoj, kiuj aranĝis rajdan savekspedicion por helpi la aliajn.

"Ni sekvis iliajn spurojn kaj trovis ilin en terura stato. Ni reatingis ilin lamantajn laŭlonge de la pado. Multaj el ili estis duonmortantaj kaj ni devis eltiri ilin el tia situacio kiel eble plej frue. Ni pasis la kvin sekvantajn tagojn helpante ilin kaj ilin kuraĝigante daŭrigi. Intertempe ni gajnis ilian konfidon kaj mi certigadis ilin ke ili ne estos forpelataj ree al Tibeto."

Ili kontaktiĝis kun la Nepala polico, kiu disponigis ĉevalojn por transporti la tibetanojn al barakaro de rifuĝintoj. Tiel ili atingis urbeton kun kampa hospitalo, kaj telefono. Doktoro kuracis ilin dum Stuart telefonis al la Alta Komisararo por la Rifuĝintoj en Katmanduo. Poste oni aviadile transportigis ilin al Katmanduo, kie la rifuĝintoj alvenis la 29-an de decembro.

"Pluraj bezonis operaciojn, kaj bedaŭrinde unu mortis en la hospitalo." La 1-an de januaro, al la 22-jara Taga, el orienta Tibeto, oni devis amputi ambaŭ kruojn sub la genuoj, kazo priskribita de fakisto kiel "la plej aĉa kiun mi iam vidis". Kaj al du aliaj (inter 20- kaj 30-jaraj), oni jam amputis fingrojn de unu aŭ ambaŭ piedoj, kaj oni ege timis ke tri aliaj perdos piedfingrojn aŭ parton de siaj piedoj.

"Sed ili estis ege dankemaj al Claire kaj mi, ke ni sukcesigis ilian vojaĝon. La monaĥino eĉ diris al Claire kaj mi: "Vi estas miaj patro kaj patrino. Sen vi, mi jam estus mortinta".

Nun kiam la rifuĝintoj estis en sekureco, la paro devis reflugi al Britio. Deziresprimante al ili bonan vojaĝon, multaj el la rifuĝintoj havis larmojn en la okuloj. "Tio estis tre emocia. Fakte nur tute hazarde tio okazis al ni. Sed jen travivaĵo kiun ni neniam forgesos."

Claire McNaughton diris ke ili esperas reiri al Himalajoj por vidi kiel la tibetanoj resaniĝas: "Mia lasta memoro estas miksaĵo de la ŝoko vidi kiel grave vunditaj ili estis, kaj de la kontenteco ke ni povis helpi nian proksimulon, eĉ kvankam ni ne kapablis paroli kun ili. Estis ligo inter ni. Ni ankaŭ havis rektan sperton de la tragedio de Tibeto, kaj tio malfermis niajn okulojn." □

(Sintezo de 4 artikoloj publikigitaj en *TIN-News*, *Hong-Kong Standard*, *The Times* kaj *The Independant*, 14/17-1-98; repr. de *Agora* k senditaj de G. Gentile.)



La ĉina ministro de la aferoj eksterlandaj diris en januaro ke la ĉina registaro estas preta iam ajn akcepti viziton de Mary Robinson, la UNa Komisararo por **Homaj Rajtoj** nomumita lastan septembron, post sia sepjara prezidentado de Irlando. Ŝi ricevis (de la mano de G. Torn, eksprez. de la Eŭropa Komunumo) la premion "la Eŭropano de la jaro" 1997. Ŝi tiam diris: "**Mi bezonas** (...) la amaskomunikilojn kaj la NROjn, sed ankaŭ la registarojn, por laŭte aŭdigi la voĉojn de la viktimoj". □ (*World Tibet Network News* k *La Vie*)

## Morto de 2-jara bebo

Sepan morton raportis alia grupo de rifuĝantoj kiuj atingis la unuaj domoj de la distrikto Nubri, 130 kilometrojn nord-okcidente de Katmanduo, la 24-an de decembro. La grupo, kiu konsistis el 26 getibetanoj, ricevis gastigon de la lokuloj en la vilaĝo, sed diris ke dujara bebo mortis pro malvarmo tri tagojn antaŭe, tuj post kiam ili trapaŝis la trapasejon en ĝistalia neĝo.

"En la mateno de la 25-a de decembro du tibetanoj venis al la domo kie ni restadis kaj petis medicinaĵon kontraŭ frostvundoj", diris Hjung Ŭu Kim, 29-jara montgrimpisto el Koreio, kiu estis en la vilaĝo reveninte de provo al la supro de la monto Manaslu, 8.156-metrojn alta. "Ni iris vidi la grupon; unu el la viroj kaj du el la virinoj havis frostigitajn piedojn kaj piedfingrojn", li diris.

La Koreoj kaj lokala Ŝerpa aranĝis ke la tri frostvunditoj kaj du aliaj flugu kun ili per helikoptero al Katmanduo, post kiam unu membro el la teamo proponis lasi sian sidlokon kaj aranĝi ke la ekipaĵo kaj provizo de la teamo estu malŝarĝata el la helikoptero, kaj anstataŭe estu perpiede transportata al Katmanduo.

Oni timegas ke Taŝi Tsomo, 14-jara knabino el Orienta Tibeto, perdos ĉiujn fingrojn de la dekstra piedo, kaj knabo de la sama regiono perdos iujn el siaj piedfingroj, laŭ raporto el la ĉefurbo.

La resto de la grupo alvenis al Katmanduo, kie UNO aranĝas la transiron de rifuĝantoj, por ke ili kuniĝu al la ekzilita tibeta komunumo en Bharato, la 2-an de januaro.

"Kion alian ni povus fari krom helpi ilin?", diris s-ro Kim. "Ili aspektas kiel ni, Koreoj (...) kaj ni ĉiuj estis maltrankvilaj pri ili." S-ro Kim laŭdis la lokalajn Ŝerpa-ojn pro tio ke ili faras al si penojn por helpi la rifuĝantojn.

Pli ol 2.200 tibetaj rifuĝantoj alvenis en Nepalon en 1997, ĉirkaŭ la duono el ili en la lastaj tri monatoj. (Por 1998 oni atendas 5.000 novajn!) Ĉirkaŭ 500 el ili estas infanoj malpli ol 14-jaraj, kaj ĉ. 1.000 estas gemonahoj. Ĉiujare la nombro de fuĝantoj multe kreskas dum la vintro ĉar ili prave opinias ke tiam estas malpli da gardistoj kaj patroloj ĉe la landlimo. □

# Neve Ŝalom / "Oazo de

Fine de la venonta *Interreligia Seminario Esperantista* organizita de s-ro Jeremi Giŝron en Jerusalemo, sub la aŭspicioj de ASISTI, okazos komuna tuttaga vizito al *Neve Ŝalom*, la 24-an de aprilo. Por prezenti tiun ĉi tute specialan vilaĝeton, kiun ankaŭ la redaktoro vizitis (en 1981), ni publikigas tiun ĉi intervjuon de J. Gishron kun ties kunfondinto, s-rino **Anne Le Meignen**, mallonge post la forpaso de Frato Bruno Hussar. (Pri la ISE, vidu p. 10)

– *Kiel naskiĝis la ideo fondi Neve Ŝalom, kaj kiuj fondis ĝin ?*

Frato Bruno Hussar estis la unua kiu viziis la starigon de tiu ĉi porpaca komunumo. La historio de *Neve Ŝalom* komencis kiam ni du ricevis terpecon por lui, de la Fratoj de la Monaĥejo en Latrun\*, kaj ni du estis la unuaj kiuj supreniris la monteton "la Colline" [pron. *la kolin*, ĝuste : "la Monteto", en la franca] en 1970. Tiam estis nenio tie, nek akvo nek elektro, kaj ni devis unue zorgi por aranĝi tiujn aferojn.

En 1972 Bruno kaj kelkaj volontuloj el eksterlando jam ekloĝis tie kaj tiu volontula fazo daŭris ĝis 1977, kiam la unua familio alvenis al la monteto. Post du jaroj la komunumo jam kreskis kaj konsistis el kvar familioj kiuj loĝis tie : tri judaj kaj unu tradicia islama familio (palestina). Se la araba familio estis religia, la judoj estis preskaŭ ateistoj.

– *Kie troviĝas Neve Ŝalom ?*

La monteto sur kiu troviĝas *Neve Ŝalom*, situas precize ĉe la komenco de la juda montaro, preskaŭ duonvoje inter Tel-Aviv kaj Jerusalemo. La plej proksima urba estas Ramle, ĉefurbo de nia lando dum la islama epoko, dekkvin kilometrojn for. La loko estas tre proksima al la konata monaĥejo Latrun, al kiu la tereno apartenas ; kaj ŝajnas ke la loko ankaŭ havas pli antikvan signifon ĉar tie, laŭdire, la suno haltis por Jehoŝua super la valo Ajalon (Jos 10,12). En moderna historio ĝi estas konata pro la akraj bataloj kiuj okazis tie dum la milito de sendependiĝo en 1948 (en la ĉirkaŭaĵo ekzistas milita muzeo). Ĝi tiam nomiĝis "Bab el Ŭad" kaj, proksime, estas la komenco de la nova vojo kiu foje savis Jerusalemon, la tiel nomata "Birma vojo" (nura polvovojo).

– *Kiom da familioj nun loĝas tie ?*

Tie jam loĝas 27 familioj, kaj la infanaro ampleksas ne malpli ol 55 infanojn. Baldaŭ alvenos ankoraŭ kvin familioj, tiel ke je la fino de la jaro [1996], la nombro estos tridek du familioj. Tamen ni bonvenigus multajn pliajn familiojn, kaj espe-

ras iam kreski ĝis almenaŭ cent familioj. Krom tio laboras tie ses volontuloj el eksterlando. Ni sukcesis plenan **miksadon** inter la juda kaj araba popolelementoj, kaj **unu duono estas judoj, la alia, araboj**.

– *Mi aŭdis ke vi havas **Lernejon de Paco**. Kiel ĝi funkcias ?*

La eduka programo estas unu el la ĉefaj principoj en tiu porpaca komunumo. Unue ni havas lernejon por la infanoj kiuj loĝas tie. Ni havas infanejon, antaŭlernejon kaj lernejon. En tiu lernejo, kiu cetere estas rekonita de la ŝtato, lernas ankaŭ multaj infanoj de la ĉirkaŭaĵo, tiel ke pli ol du trionoj el la 90 infanoj venas de ekstere.

Sur pli alta nivelo ni aranĝas seminariojn kaj renkontiĝojn por vizitantaj klasoj de junuloj kiuj estas en la lasta klaso de la mezlernejo, tio estas la lasta jaro antaŭ ol ili iros al la armeo, al la universitato aŭ aliloken. Jam ĉirkaŭ 17.000 lernantoj vizitis nian vilaĝon dum niaj 2-3 tagaj seminarioj, kaj ĉirkaŭ **1.500 instruistoj**. Tiu estas la konata "Lernejo de Paco", kaj ankaŭ ĝi estas rekonita de la ŝtato, kiu partoprenas en la kostoj por ĉiu mezlernejo kiu vizitas nian vilaĝon.

Lastatempe ni eĉ starigis kursojn en la universitatoj de Tel-Aviv kaj Beer-Ŝeva, kaj tie oni lernas unujaran kurson kiu inkluzivas kelksemajnan restadon en *Neve Ŝalom*. Oni ankaŭ planas malfermi tian kurson en la Universitato de Jerusalemo.

La bazprincipo de la vojo estas interkonatiĝo. Oni kvazaŭ fariĝos membro de ronda tablo kiu havas tri piedojn. La unua piedo estas la vilaĝo mem kun ties familioj kaj ties lernejoj. La dua piedo estas la *Lernejo de Paco*, kiu gastigas grupojn kaj aranĝas seminariojn, ktp. La tria piedo estas pli profunda studado de la esenco de paco, serĉi la vojon al paco tra la religia fono. Por tiu lasta celo oni starigis specon de Medito-centro, la tiel nomata *La Dumja*, "**La Silentejo**", kaj plantis kvietan boskon ĉirkaŭ tiu eta sanktejo.

\* Cisterciana abatejo, kies diservoj estas parte en la araba kaj parte en la franca. (*Noto de la redaktoro*)



# Paco" / Wāḥat as-Salām

Nia vojo al paco nomiĝas malfermiĝo : necesas esti malfermita al la aliulo por koni ties problemojn , revojn, ktp. Sed dum tia malfermiĝo oni samtempe devas gardi kaj evoluigi la propran identecon, kiu ofte povas eĉ evolui [ĝuste] dank'al la rilato kun la aliaj homoj. Pri la iomete pli profunda aspekto, kiu havas **religiajn dimensiojn**, ni ankoraŭ iomete palpumadas. Ni tamen provas konduki seminariojn por evoluigi ankaŭ tiun lastan aspekton, kunvenojn en kiuj ni estas tre proksimaj al la diversaj sanktaj tekstoj kiujn oni pri-diskutas kaj komparas iom polemikante.

– *La lingva demando interesas la esperantistojn : kiel vi solvis aŭ provas solvi ĝin ?*

La infanoj kiuj elkreskas en nia vilaĝo lernas frue la lingvon de la najbaroj, ĉu la araban, ĉu la hebrean. Kaj en la lernejo oni uzas la sistemon, ke **ĉiu instruisto instruas en sia propra lingvo** : kelkaj lecionoj estas instruataj en la araba kaj sekve aliaj en la hebrea. Kiam infanoj alvenas el la ĉirkaŭaĵo, oni kompreneble devas unue instrui al ili, dum unu aŭ du jaroj, la gefratan lingvon. Por internaciaj aŭ transnaciaj kontaktoj, ni uzas ĉefe la anglan, kiu ankaŭ estas instruata al la infanoj.

Do, koncize, oni povus nomi tion "dulingva sistemo", kun iom aparta statuso por la fremda kolonia lingvo, la angla. Sed nia monata revuo tamen aperas en la franca, redaktita de mi mem, ĉar la vilaĝo ja estis fondita de du franclingvanoj. Pri esperanto ni ankoraŭ ne multe aŭdis.

– *Kiam mi interparolis kun Bruno Hussar antaŭ kelkaj jaroj, li montris sian varman intereson pri la lingvo\*, kaj diris ke se li estus nur iomete pli juna li verŝajne volus lerni la lingvon.*

*Kio pri la ekonomio. Ĉu vi vivas per kontribuoj ?*

Ni havas nian propran ekonomion, bazitan sur la produktado de la vilaĝo, sed certe ankaŭ kontribuoj ludas gravan rolon. Ni havas amikajn societojn en kelkaj landoj, interalie en Francio, Belgio, Italio, Svislando, Usono kaj Kanado.

\* "Fakte, mi sukcesis vidi lin lastfoje unu semajnon antaŭ lia morto, kaj mi povis konstati lian intereson por Esperanto. Naskita en Egiptio de hungaraj gepatroj, li havis longan kaj buntan vivhistorion. Lia gepatra lingvo estis unue la germana, sed ankaŭ la franca." (*El lia letero je 5-4-1996*)

Ofte ni ricevas kontribuojn kiuj sufiĉas por komenci apartajn projektojn, kaj ni tuj komencas, esperante aliajn kontribuojn kiuj helpu nin daŭrigi kaj iam fini konstruaĵon. Ekzemple nia hotelo kaj gast-domo estas tiel konstruita, kaj lastatempe ni fine sukcesis kompletigi nian naĝbasenon, post pli ol dekjara konstruado.

– *Kiel vi estas organizitaj ? Ĉu vi kondukas komunan vivon kiel en la kibucoj aŭ alie ?*

Ne, ni ne estas kibuco kaj eĉ ne moŝavo ([vilaĝeca] kunlabora organizo), sed **ni estas simple normala vilaĝo**. Ĉiu familio prunteprenas mem monon kaj konstruas sian domon. Ni tamen kolektive luas la terenon de la monaĥejo Latrun, kaj krome ekzistas la organizo *Neve Šalom*, en kiu ĉiuj estas membroj. Sed ĝi estas nur organizo por la paceduka projekto kaj preskaŭ ne miksas sin en la normalan vivon de la vilaĝo. Nur tiaj normalaj komunaj aranĝoj ekzistas, kiaj estas bezonataj en ĉiu alia vilaĝo. Ni elektis tian vojon por certigi ke ĉiu familio firme tenu sian propran identecon, ĉu juda, ĉu araba, ĉu religia, ĉu agnostika.

Pri nia organizo, krome, estas tre grave ke nia mezgrada lernejo estas rekonita de la aŭtoritatoj kiel "Speciala Lernejo", kaj ke granda parto de la salajroj al la instruistoj estas pagataj de la ŝtato. Krome la ŝtato ja partoprenas en la kostoj por ĉiu vizitanta grupo al la "Lernejo de Paco".

– *La junulara Esperanto-organizo en Israel, JELI, organizis pacseminaron en Neve Šalom. Ĉu vi scias pri ĝi kaj kiel ĝi sukcesis ?*

Mi ne memoras tion, ĉar estas tiel multaj grupoj kiuj venas al *Neve Šalom* (...)

– *Iom por aldoni ?*

Nur, ni gardu en la koro la memoron de Frato Bruno Hussar, la viziulo de la tuta projekto kaj mia kunfondinto, kiu forpasis la 25-an de februaro [1996]. Li estas enterigita en *Neve Šalom* (...) Li ricevu rekompencan de Dio en la Paradizo.

Fine mi povas **resumi** per kelkaj vortoj nian etikan vojon : **renkontiĝo sen antaŭjuĝo** sed kun samtempa gardado de la propra identeco, kaj krome, **plena libereco de religio kaj de ĉia religia pensado aŭ opinio**. Tiu lebereco enhavas en si profundan **respekton por la religio kaj la religuloj**, negrave ĉu temas pri juda, islama, kristana aŭ alia religio, ankaŭ el la horizonto de la agnostikuloj kaj ateistoj. Oni ne forgesu ke nia fondinto Frato Bruno estis profunde religia homo. □

## La 4-a ISE, en Jerusalemo

(20/26-4-1998) : Program-komplemento

La oficiala lingvo<sup>1</sup> de la *Interreligia Seminario Esperantista* estos Esperanto. Krome, kelkaj [ne-esperantistaj] prelegontoj parolos en la franca : ni aranĝos pri konvena esperanta traduko. La loka lingvo estas [ĉefe la] hebrea (...)

Plie de la **prelegoj** anoncitaj en la antaŭa n-ro aldoniĝas du prelegoj de Jaakov Bar : "*Ŝintoismo kaj Judismo, komparitaj el geografia vidpunkto*", kaj "*Kelkaj personaj cerbumoj pri la vojo de Tenko San kaj Ittoen, kaj ilia devizo Kredo kaj laboro*".

– Pavla Dvořáková, kiun iuj jam bone konas<sup>2</sup>, partoprenos, kaj helpos per "*Kanto-vespero de religiaj himnoj*" ; ŝi ankaŭ prelegos, pri "*Simboliko : de religia al monda simboliko*"

– Anne Le Meignen, dua kunfondintino de *Neve Šalom*<sup>3</sup>, parolos pri ilia filozofio kaj la evoluo de tiu mondfama eksperimento (eĉ proponita por la Nobelpremio pri Paco).

– Arĥitekto kaj ciberteknikisto Jiĉhak Ĥajutman, nepo de la fondinto de Tel-Avivo, parolos pri la eblecoj starigi *Pacan Templon* en Jerusalemo, sen ofendi la sentojn de iu : nek la kristanoj, nek la islamanoj, nek la sekularecaj judoj. Li prezentos specon de nova *spirita* cionismo.

– Prof. Amri Wandel klarigos pri la eblecoj ke Tel-Aviv kaj Israelo fariĝu en 2000 la gastigantoj de la UK (la decido okazos tuj post la Seminario !), kaj pri la signifo de la 50-jara jubileo de Israelo. Ankaŭ la lokaj esperantistoj estos invititaj.

### Proponitaj diskutoj

– Pilgrimado : ĉu eblas Esperanta pilgrimado ? ĉu piede, ĉu aviadile, ĉu eĉ elektronike ?

– Pri Johano Amos Komenius kaj lia opinio pri la graveco de vojaĝoj por la homa kleriĝado.

– Kiel mia religio difinas la aliajn, kiuj havas alian kredosistemon ? Tiu parto de ĉia *memdifino* kiu konsistas el la najbaro kaj lia "neproevidenta" [tiele] ekzistado, estas ege interesa afero.

– Post Oomoto, Bahaismo<sup>4</sup> kaj Ŭon-budhismo, kia ŝanco ke katolikismo elektos Esperanton<sup>5</sup> ? (Diskuto surbaze de la libro de G. Korytkowski "*Internacia lingva komunikado en la Eklezio kaj nuntempa mondo*" [Varsovio, 1986].) Kion pri aliaj religioj : Judismo, Islamo, Hinduismo ktp. ?

– Ekonomio kaj religio. Kia estas la hodiaŭa situacio post la ŝajna disfalo de la "troa" komunisma utopio : ĉu la religioj povos bridi la galopantan merkaton – la elektronikan cerb-inundon ?

– La vojo de Esperanto : kiel altigi la esperantan "mondkulturon" al iom pli altaj niveloj per helpo de religioj kaj komuna kredado. Kion pri preĝado en kaj per Esperanto ?

J. Gishron, 9-2-1998

## Aliaj prireligiaj renkontiĝoj

**Internacia E-Seminario "La religio kaj la homaro", 2-5 de aprilo 1998 en Karlovo (BG).**  
Alta protektanto : La Bulgara Patriarko Maksim.

Celo : Kontaktoj de reprezentantoj de religioj tutmonde prezentantaj iliajn konceptojn, kaj kontribuo por la vivo, kulturo kaj kutimo de la homaro. Diskutado pri la eblecoj de komuna solena renkontiĝo pro la jubilea 2000-a jaro flanke de la monda kristanaro, sendepende de ilia religia aparteneco.

En la programo : prelegoj, diskutoj, renkontoj, E-diservo, ekskursoj k.a.

Ĉio inkludite : 80 US\$ (50 \$ por prelegontoj). Eblecoj de antaŭ- kaj post-kongresoj (1/10-4-98). Organizita de Bojidar Leonov (vd p. 29) : p.k. 44, BG-4300 Karlovo. Tel. +359 (0)335 3933 kaj (0)335 4947.

### Ne E-kunvenoj de IARF

– Jarkunveno, kun temo : "*Religia diverseco en Eŭropo : riĉeco aŭ bariloj ?*", 3/5-7-1998 en Bad Boll (D), kunorganizita de *Evangelische Akademie*.

– "*Junularo k religio en Eŭropo*". Sam-tempa k-loka. Aliĝo P. Boddaert, Papenburg 101', NL-1011 TW Amsterdam, faks. +31 20626008 ; peronne@wirehub.nl

**13a Ekumena E-Kongreso, 25-7 ĝis 1-8-98 en Nantes (400 datreveno de la *Edikto de Tolero*)**  
Informoj/aliĝo : Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio (diaregno@altern.com). 1600/800 FRF laŭ landoj.

### Mesaĝo al teologoj (profesiaj aŭ ne)

Ph. Cousson (red. de *Dia Regno*), deziras koni nomojn kaj adresojn (kun tel., faks. ktp.) de esperantaj pastoroj, pastroj, studa(/i)nt(in)oj pri teologio, predikistoj, katekistoj ktp., al kiu ajn kristana eklezio ili apartenas ; kaj kiujn kristanajn revuojn vi ricevas aŭ povas atingi (per biblioteko), en E k naciaj lingvoj (kun nacilingva nomo, konfesia koloro, adreso, ISSNnumero). Kaj profesiajn (aŭ preskaŭ) bibliotekistojn, samtempe kristanajn k E-ajn.

### Nacilingve okazis

– 4500-homa *Inter-tradicia renkontiĝo* ĉirkaŭ la Dalai-Lamao, 30-4-97 en La Rochette (Alpoj).

– 450-homa interreligia kongreso por la paco, en Bruselo, 14-9-97, sub aŭspicioj de UNESKO...

– 600-homa kongreso en Nice, *La sakrala senco de la vivo*, prezidita de A. Desjardins, 15-1-98.

1/ Eventualaj dokumentoj estos redaktataj nur en E.

2/ Ŝi estis la ĉefkunordigintino de la 1-a kaj 3-a ISE.

3/ Vidu sur la ĵus antaŭaj paĝoj.

4/ Bahaanoj, krom BEL-anoj, ne elektis Esperanton sed nur pledas por universala helplingvo. (Redaktoro)

5/ Vidu pri E-lingva Papa aŭdienco al la 50-a IKUE-kongreso (3-9-97), en *Esperanto* 1897 (nov. 97), p. 187.

# La Serio pri Gilgameŝ

Kio estas nomita "III. Tabulo" en la traduko de K. Kalocsay<sup>1</sup> fakte konsistas el parteto de la 8-a tabuleto kaj ĉefe el parto de la 7-a. La leganto do ne provu kompari ĝin kun la jena vera 3-a Tabuleto.


(...)<sup>2</sup>  
La okul[oj de Enkidu]  
[estis] lar[me ŝveliĝintaj],  
l[ia] koro,  
[ĉagreninva]dita :  
li fariĝis  
malvigl[ega (?)].  
[Kun okuloj]  
larme ŝveliĝintaj,  
(kaj) kun koro [ĉagreninvadita] :  
(li,) Enkidu, estis malvigl[ega (?)].  
[(Tiam) Gilgameŝ'] klinante la vizaĝon,  
[alparolis] Enkiduon :  
"[Ki]al (do), [amiko mia,]  
la okuloj cial  
[estas la]rme [ŝveliĝintaj],  
cia [koro] [ĉagreninvadita],  
[kaj ci]  
malvigl[ega (?)] ?"  
En[kidu (do) malfer]minte [sian buŝon]  
alparo[li]s Gilgameŝon :  
"(Miaj) plendoj, ho amiko mia,  
rigidigis miajn kol-muskolojn,  
senfortigis miajn brakojn,  
neniigis mian energion !"  
Kaj Gilgameŝ, malferminte sian buŝon,  
alparolis Enkiduon :  
" (... ) [En la Arbarego]  
[vivas Hu]ŭaŭa-la-feroculo :  
[mi kaj ci]  
[lin iros b]uĉi  
[por forigi el la tero]  
[la sinistran nocegulon] !  
Ni dehakos  
Cedrojn (... ) "  
(Sed) [Enkidu] malferminte sian buŝon,  
alparolis Gilgameŝon :  
"Mi eksciis en la stepo,  
ho amiko mia,  
kiam mi vagadis tie  
kun la herdo :  
la ĉirkaŭo de la Arbarego  
estas kvincent-kilometra<sup>3</sup>.  
K[iu] tien  
povos malsuprenpenetri ?  
[Huŭaŭ]a' krianta  
(estas) Diluvpluvo,  
lia buŝo Fajro,  
lia elspiraj' la Morto !

Kial  
metis ci en cian kapon  
tian entreprenon ?  
Bataleg'  
nealfrontebla  
(estas la aliro al) la ejo (?)  
de Huŭaŭa !"  
Sed Gilgameŝ,  
malferminte sian buŝon,  
[alpa]rolis Enkiduon :  
"Mi volegas  
grimpi sur la Monton  
[de la Arbareg' de l'C]edroj !  
(... )  
[Mi volegas iri]  
al [la Arbarego]  
kie [Huŭaŭa']  
resta[das] !  
(... )  
Ci, ci [faros  
kiel ci preferas (?)],  
kaj mi,  
mi p[enetro]s en la Arbaregon (?) !"  
Enkidu'  
malfer[mis sian] buŝon  
kaj li alparolis  
Gilgameŝon :  
"Kiel n[i,] ni povus finatingi  
la [Cedr-]Arbaregon ?  
Ĝin prigardas Ŭer,  
la di' [de l' fulmotondroj (?)],  
potenculo  
kiu ne do[rmemas] !  
Ŭer mem  
[komisiis (?)] Huŭaŭaon,  
Adad  
[lin elektis (?)] !  
Kaj al li,  
[Huŭaŭa],

1/ Tutmonda sonorilo, Budapest, 1981, vol. I, p. 9-11.

2/ Ŝajnas ke la restado en urbo deprimis Enkiduon...

3/ Laŭvorte "60 beru-oj", kaj unu beru estas ĉ. dek-kilometra. Sed por la akadanoj 60 estas malpreciza rondegna nombro (tial, ekzemple, niaj nunaj horoj konsistas el 60 minutoj) ; mi do preferis samefektan tradukon per la (por ni) rondegna cifero 500 anstataŭ la pli preciza sed iom stranga 600. Same, pli poste mi anstataŭigis 90 kg per 100, 60 per 50, 15 per 10.



*Dorsflanko de la 3-a tabuleto, komenciĝanta ĉi sube*

por protek[ti]  
 [la Cedr-Arbaregon],  
 [Enlil (?) atribuis]  
 la Sep Terurilojn !"  
 (Sed) Gilgameŝ,  
 malfer[minte] sian buŝon,  
 alparolis  
 E[nkiduon] :  
 "Kiu, ho amiko mia,  
 povus la ĉielon eskaladi ?  
 Nur la dioj tie lo[ĝas],  
 en la kompani' de Ŝamaŝ, poreterne !  
 (Sed) la homoj  
 (havas) siajn tagojn kalkulitaj :  
 ĉio kion ili faras  
 estas vento !  
 Ci mem, tie ĉi (estanta),  
 se ci timas morti,  
 kio iĝis la potenc'  
 de heroismo cia ?  
 Antaŭ ci mi tuj foriros,  
 (nur do) krii al mi : "Ek ! Ne timu !"  
 Se faligos min la morto,  
 mi almenaŭ estos akirinta famon !  
 Oni diros ke Gilgameŝ  
 kontraŭ Huŭaŭa'-la-feroculo  
 ekbatalis !  
 Al ci, naskiĝinta kaj kreskinta  
 en la stepo,  
 al ci kiun la leonoj sturmis,  
 (ĉu ne) kompreneblas ĉio (tio) ? ( . . . )

La infanoj estas en la mo[nd'] naskitaj  
 ne [por resti en nenifarado (?)] !"  
 Sed Enkidu malferminte sian buŝon [kaj ekparolante],  
 [alparolis Gilgameŝon] :  
 "Ho, amik', al ni [ne eblas (?)]  
 iri al renkonto lia,  
 al ni [ja ne eblas]  
 [iri al renkonto de] Humbaba<sup>4</sup>."

( . . . ) Ci ĉagrenas min  
 (sed) mi decidis  
 [iri]  
 haki la Cedregojn,  
 per mi mem farante (tiel) al mi  
 poreternan [famon] !  
 [Ek !] amiko,  
 iru (?) ni al la Forĝejo :  
 sub okuloj niaj,  
 oni forĝu (por ni) [armilarojn (?)] !"  
 Ili do al la Forĝejo  
 [kune] iris.  
 La forĝistoj kiuj estis tie,  
 inter si konsiliĝinte,  
 fandis  
 hakil(kling)ojn :  
 ĉiu hakileg' por ili  
 estis po cent-kilograma ;  
 ili fandis  
 tranĉilegojn :  
 ĉiu ties klingo  
 estis kvindek-kilograma,  
 (kaj) la ingoj (?)  
 po dek-kilogramaj.  
 Ili (ankaŭ) fandis orajn ponardegojn  
 po dek-kilogramajn.  
 Ĉiu kun ŝarĝeg' – po 300-kilograma ! – ,  
 kaj Gilgameŝ kaj Enkidu  
 [reenvenis] en [Ur]ukon  
 tra l' Sepstanga Pordo.  
 [Ĉe no]vaĵo (tia)  
 la loĝantoj amasiĝis,  
 [kaj eksplodis] ĝoj' (ilia) en la stratoj  
 de Uruk la vojkruciĝoplana !  
 Gilgameŝ aŭdinte  
 tiun ĉi ĝojegon,  
 [de la loĝantaro]  
 antaŭ li [st]aranta  
 [en la stratoj]  
 [de U]ruk la vojkruciĝoplana,  
 [jone alpa]rolis  
 [la loĝantojn]  
 [de Uruk] la vojkruciĝoplana :  
 "[Mi decidis iri trovi]  
 [Huŭaŭa'-la]-fe[roculon],  
 vidi (tiun) supernaturulon  
 kiun oni priparolas,

kies nom' senĉese disvastiĝas  
 en la tuta mondo ! ,  
 (kaj) lin venki  
 en la Arbareg' de l' Cedroj ;  
 kiom estas Urukid' potenca,  
 volas mi aŭdigi al la mondo.  
 Propramane  
 mi dehakos Cedrojn,  
 tiel per mi mem farante al mi  
 poreternan famon !"

(Sed) Enkidu (alparolis)  
 la Maljunularon  
 [kaj li diris (?)] :

"(Se) la viroj de Uruk'  
 [lin kuraĝigas (?)] :  
 (vi, bonvolu) diri al li  
 ke li ne foriru al la Arb[arego] !  
 Jen ekspedicio neentreprenenda :  
 estas li (nur) homo (?) (...),  
 kaj la prigardanto de la Ar[barego]  
 [estas senkompata (?)].<sup>5</sup>

(Kaj) la Maljunuloj  
 de Uruk la vojkruciĝoplana  
 (tuj) respondis  
 al Gilgameŝ :

"Juna estas ci, Gilgameŝ,  
 cia koro cin kuntiras !  
*ci ne tute scias kion ci mem priparolas :*  
*ĉu de papilio estas ci naskita ?*<sup>6</sup>  
 ci (ja) ne komprenas  
 kion ci faranta estas !  
 Aŭdis ni paroli  
 pri Huŭaŭa la monstrego :  
 kiu  
 povas (do) alfronti la armilojn liajn ?  
 La ĉirkaŭo de la Arbarego  
 estas kvincent-kilometra :  
 kiu  
 tien povos malsuprenpenetri ?  
 Huŭaŭa' [kr]ianta  
 (estas) Diluvpluvo,  
 lia buŝo, Fajro,  
 lia elspiraĵ' la Morto !  
 Kial metis ci en cian kapon  
 tian entreprenon ?  
 Bataleg' nealfrontebla  
 (estas) la aliro al la ejo (?) de Huŭaŭa !"

Gilgameŝ, aŭdinte  
 la alparoladon de l'Konsilantaro sia,  
 ekrigardis al amiko [sia]  
 ridetante :

"Nun [am]iko m[ia],  
 kion havas mi por diri, estas jena.

(Eĉ se) lin mi timas,  
 iros mi  
 [kaj lin alfrontos (?)]. (...)"

(Kaj la maljunuloj diris :)  
 "(...) Cia (protektanta) dio  
 [akompanu cin  
 (kaj) li cin igu  
 vojon (re)eki[ri]  
 ĝis la Kajo  
 de Uruk la vojkruciĝoplana !"

Gilgameŝ kliniĝis  
 antaŭ Ŝamaŝ :  
 "[Tiel estu ĝuste]  
 kiel ili diris !  
 Estas mi tuj forironta, Ŝamaŝ  
 (...)!  
 Povu mia v[ivo]  
 esti ekde nun gardata !  
 (Kaj) min revenigu al la Kajo  
 [de Uruk la vojkruciĝoplana] !  
 Kovru [min]  
 per cia protektado (...)"

(...)

El l' okuloj de Gilgameŝ  
 fluis larmoj :  
 "[Estas mi tuj ekironta] vojon  
 kiun mi neniam sekvis,  
 kies itineron mi ne konas,  
 dio mia !  
 Se (dank'al ci)  
 mi konservos [mian vivon],  
 [mi] cin [servos (?)]  
 e[n ĝ]ojego !  
 En la templo  
 [estos] mi [ra]vita de la ĉarmoj ciaj :  
 [ĉie]  
 [cin instalos mi] sur tronojn !"

[Estis alportata (?)]  
 lia ekipaĵo :  
 [hakilegojn],  
 [tranĉi]legojn,  
 [ark]ojn  
 kaj sagujojn,  
 oni enmanigis al li  
 (...).

Kaptis li  
 la hakilegon sian,  
 [surŝultrigis (?)]  
 la sagujon sian  
 kun la ark' Anzana,  
 [eningante (?)] ĉe la zono  
 sian tranĉilegon.

(Dum) ekiris ili,  
 [de la ĉefa s]trato  
 [la ama]so  
 adiaŭis Gilgameŝon :  
 "[Kiam]  
 ci revenos en la urbon ?"  
 Kaj [la ma]ljunuloj,  
 lin adia[ŭ]ante,  
 lin konsilis  
 [por] vojaĝo (lia) :  
 "[Ne tro] fidu ciajn f[or]tojn,  
 Gilgameŝ',  
 atentu !  
 (kaj) okuloj cial estu viglaj !  
 [Ma]rŝu antaŭ ci  
 Enkidu.  
 Li (jam) sekvis (tiun) [vo]jon,  
 [ko]nas li la itineron  
 kaj la enirejojn  
 de la Arbarego,  
 kaj ja ĉiujn la kaptilojn  
 [de Huŭaŭa] !  
 [Kiu marŝas] la unua  
 ŝildas sian vojkunulon !  
 [Est]os li gard[ema]  
 k[aj] okuloj liaj estos viglaj !"<sup>7</sup>  
 Ŝamaŝ [povu]  
 cin [kondu]ki al tri[u]mfo ;  
 li malkovru (ja realigita) al okulaj cial  
 (ĉion) kion cia buŝo diris ;  
 li malfermu por ci  
 la baritajn vojojn ;  
 li al cial paŝoj  
 faciligu ĉiujn padojn,  
 al piedoj cial  
 faciligu ĉiujn montojn (?).  
 Cial noktaj (songoj)  
 estu bonaŭguraj !  
 Lugalbanda helpu cin  
 triumfi !  
 Kiel eble plej rapide  
 venku !  
 Kiel havas ci  
 deziron,  
 trempu la piedojn cialn  
 en la Riverego de Huŭaŭa !  
 ĉe bivakoj cial  
 ci elfosu puton,  
 por ke ĉiam estu  
 pura akvo en felsakoj cial  
 por al Ŝamaŝ oferverŝi  
 [f]reŝan akvon,  
 sen forgesi  
 Lugalbandon !"

(Kaj) [Enkid]u, malfermite sian buŝon,  
 alparolis Gilgameŝon :  
 "Cian vojon iru (do), [Gilgameŝ],  
 [ki]el ci batalis (ĉiam kun sukceso) !  
 Cia kor' [sentima] estu !  
 Alrigardu al mi :  
 konas mi  
 la ripozejon (?) de Huŭaŭa,  
 same kiel  
 liajn plej kutimajn [ir]ojn !  
 (Kaj nun)  
 forpermesu la Maljunularon !"  
 [Kaj Gilgameŝ] diris  
 al la Maljunuloj (?) :]  
 "[Mi tuj iros trovi  
 Huŭaŭa'-la-feroculon,  
 vidi (tiun) supernaturulon  
 kiun oni priparolas,  
 kies nom' senĉ]ese disvastiĝas  
 [en la tuta mondo] !"<sup>8</sup>  
 ( . . . )"  
 [Post] deklaro (lia)  
 [al la Maljunuloj],  
 la Plenkreskaj Viroj  
 [lin fin]a[lparolis (?) ] :  
 "Iru do, Gilgameŝ,  
 (...)  
 Ŝamaŝ, cia dia protektanto  
 [akompanu cin (?) ]  
 kaj cin konduk[u]  
 [al triumfo] !"  
 ( . . . )  
 (La Nineva versio daŭrigas :)<sup>9</sup>  
 Gilgameŝ' malfermis sian buŝon,  
 ekparolis  
 kaj al Enkidu'  
 li diris :  
 "Ek ! amik', ni iru  
 al l' Palac'-plej-bela,  
 por viziti Ninsuna-on,  
 la Reĝinon grandan.  
 Saĝa kaj inteligenta  
 kaj scianta ĉion, Ninsuna'  
 dispozicios por ekspedicio nia  
 plej prudentan itineron !"  
 Manenmane  
 ekpaŝante,  
 Gilgameŝ kaj Enkidu' foriris  
 en direkto de l' Palac'-plej-bela,  
 por viziti Ninsuna-on,  
 la Reĝinon grandan.

Gilgameŝ' eniris  
 kaj alproksimiĝis antaŭ la Reĝinon :  
 "Ninsuna', (li diris), estas mi (sufiĉe) forta  
 (por) la longan vojon [sekvi],  
 kondukant[an]  
 [al Humbaba],  
 por alfronti  
 la necertan [lukton],  
 [ekveturi]  
 en la ri[skan aventuron],  
 ĝis la [tempo]  
 [de reveno mia] :  
 [kiam, alveninta]  
 [al la Arbareg' de l' Cedroj,]  
 [estos mi buĉinta]  
 [Humbaba'-la-feroculon]  
 [foriginta el la tero] la sinistran nocegulon,  
 kiun malamegas Ŝamaŝ !"

[Ninsuna'] sin izolinte  
 [en apartementoj siaj]  
 per sapherb'  
 [sin lavis (?)] ;  
 [ŝi surmetis robon]  
 bele adekvatan al (la bela) [ko]rpo ŝia,  
 [kaj al sia kolo metis kolieron]  
 belkunvenan por (la bela) brusto ŝia ;  
 [Kaj ornamiĝinte tiel,]  
 kun surkapa diademo,  
 (...)  
 (...)  
 ŝi e[lvenis (?)]  
 kaj sur la tegment-terason supreniris.  
 [Tie ?], an[taŭ] Ŝamaŝ,  
 ŝi parfum-brulujon metis,  
 kaj ofe[ron] ŝi prezentis.

Poste, kun [al] li levitaj manoj : "Kial  
 ci, atribuinte al mi Gilgameŝon kiel filon,  
 per anim' nelacigebla lin provizis ?  
 (Kaj) nun  
 ci inspiris lin  
 la longan vojon sekvi,  
 kondukantan al Humbaba  
 por alfronti  
 la necertan lukton,  
 ekveturi  
 en la riskan aventuron  
 ĝis la tempo  
 de reveno lia :  
 kiam alveninte  
 al la Arbareg' de l' Cedroj,  
 estos li buĉinta  
 Humbaba'-la-feroculon  
 foriginta el la tero la sinistran nocegulon,  
 kiun ci malamas !

Sed ci,  
 kiam ci [dormemos (?)],  
 Aja, cia novedzino,  
 mem sen timo memorigu cin :  
 konfidi (mian) propran filon  
 al la Noktgardistoj,  
 la vesperaj [steloj] ( . . . ) "  
 (Kaj) la [in]censujon estinginte,  
 ŝi ripetis longe [sian preĝon].  
 (Kaj) alparolinte Enkiduon,  
 ŝi esprimis al li sian volon :  
 "Ho potenca Enkidu',  
 ci ne el mia sin' eliris,  
 sed mi cin petegas nun,  
 je l' nomo de la dediĉitoj al Gilgameŝ,  
 de l' pastrinoj, de la konsekritulinoj,  
 kaj de l' hierodulinoj (?) !"

Tiel ŝargis ŝi la ŝultr[ojn de En]kidu  
 per misio jena,  
 dum pastrinoj prenis  
 (...)  
 kaj la "di-filinoj"  
 fortikigis (...) :  
 "Mi, (Ninsuna diris), ho Enkidu,  
 (...)  
 mi (cin) [vokis (?)]  
 por (...)".

Enkidu' [respondis]  
 al [Ninsuna] :  
 "Gilgameŝon [mi protektos (?)]  
 ( . . . )  
 ĝis [rev]eno [lia],  
 [post atingo] de la [Cedr-]Ar[baron],  
 eĉ se (multe da) mon[atoj] (li) bezonos  
 (...)  
 eĉ se jar[ojn] (li) bezonos (...) "  
 ( . . . )

4/ Humbaba estas nova prononco de la sumer-devena *Huŭaŭa*. Tiuj ĉi 4 lastaj versoj venas de tabulet-splito el Ninevo ("K.7224"). Ni enŝovis ilin en kvarversan mankon ...kvankam ili estas ĉ. 500-jare pli malfruaj !

5/ Tiu ĉi lasta provo de Enkidu persvadigi Gilgameŝon resti, estas aldono de la Nineva versio.

6/ Tiu ĉi verso estas aldono de la Nineva Versio, el la dorsflanko de la ero A.3444.

7/ La Nineva versio tie ĉi aldonas, al Enkidu :

"En la nom' de nia asembleo  
 ni konfidas al ci (nian) reĝon ;  
 (tiun) reĝon revenigu  
 por remeti lin en niajn manojn !"

8/ Triversa konjektaĵo dank'al antaŭa sama parolo.

9/ Fakte post la adiaŭo de la Maljunuloj, pli precize  
 tuj post ilia duversa parolo al Enkidu, en la noto 7. □

# La Serĉado de l'Sankta Gralo :

## Percevalo gastigata de monaĥoj

[81,19] Et après vespres li avint que il oï une cloche sonner sor destre. Et il torne cele part, car bien set que ce est mesons de religion ou hermitages. Et quant il a un poi alé, si voit que ce est une meson de religion, qui ert close de murs et de fossez parfonz.

Et il vet cele part et apele a la porte tant que len li oevre. Et quant cil de laienz le voient armé, si pensent lues qu'il est chevaliers erranz : si le font desarmer et le reçoivent a mout bele chiere. Si prennent son cheval et l'en meinent en l'estable et li donent fein et aveine a grant plenté. Et uns des freres l'en meine en une chambre por reposer. Si fu cele nuit herbergiez au mielz que li frere porent. Et au matin li avint qu'il ne s'esveilla devant hore de prime ; et lors ala oïr messe en l'abeie meismes.

Et quant il fu entrez ou mostier, si vit a destre partie unes prones de fer ou il avoit un frere revestu des armes Nostre Seignor et vouloit comencier la messe. Il torne cele part come cil qui talent avoit d'oïr le servise, et vient as prones, et cuide dedenz entrer ; mes non fera, ce li est avis, car il ne puet point trover d'entree.

Et quant il voit ce, si s'en sueffre atant et s'agenoille par defors ; et resgarde *derriere le prestre*<sup>1</sup> et voit un lit molt richement atorné si come de dras de soie et d'autres choses : car il n'i avoit riens se blanc non. Perceval resgarde le lit et avise tant qu'il conoist que dedenz gist uns hons ou fame, mes il ne set le quel, car il a son vis covert d'une toaille blanche et deliee, si que len nel pooit mie veoir apertement. Et quant il voit qu'il i museroit por noient, si i let a resgarder et entent au servise que li preudons ot comencié.

Kaj post vesproj okazis al li [Percevalo, rajdanta en granda arbaro], ke li aŭdis sonorilon sonori al lia dekstro. Kaj li turnas sin tiudirekten ĉar li bone scias ke tio estas domoj de religi[ul]o[j] aŭ ermitejo. Kaj kiam li iom iris, li vidas ke tio estas domo de religio, kiu estis fermita per muroj kaj per profundaj fosaĵoj. Kaj li iras tien kaj vokas ĉe la pordo tiel ke oni malfermas al li. Kaj kiam la enuloj vidas lin armita, tuj ili pensas ke li estas vaganta kavaliro : tial ili demetigas lian armaĵon kaj akceptas lin laŭ tre bela maniero. Tiam ili prenas lian ĉevalon kaj ĝin kondukas en la ĉevalejon kaj donas al ĝi fojnon kaj avenon grandkvante. Kaj unu el la fratuloj kondukas lin en dormoĉambron por ripozi. Tiun nokton li estis gastigata plej bone kiel la fratuloj povis. Kaj la [sekvan] matenon okazis al li ke li ne vekigis antaŭ la horo de primo ; kaj tiam li iris aŭdi meson en la abatejo mem.

Kaj kiam li eniris en la preĝejon, li vidis ĉe la dekstra parto kradon el fero malantaŭ kiu estis fratulo vestita de la "armaĵo de Nia Sinjoro" kaj [kiu] estis tuj komenconta la meson. Li turnas sin tien, kiel iu kiu havis deziron aŭdi la [di]servon, kaj venas ĉe la kradon, kaj pensas eniri enen ; sed li ne faros, tio estas lia opinio, ĉar li ne povas trovi enirejon. Kaj kiam li vidas tion, li rezignas pri tio kaj genuiĝas ekster ĝi ; kaj li rigardas malantaŭ la pastron kaj vidas liton multeriĉe ornamita tiel kiel per silkaj drapoj kaj aliaj aĵoj : ĉar ne estis io, se ne blanka. Percevalo rigardas la liton kaj ekzamenas tiom ke li [ek]konas ke ene kuŝas homo, sed li ne scias ĉu viro aŭ virino, ĉar ĝi havas sian vizaĝon kovrita per blanka kaj fajna tolaĵo, tiel ke oni ne povis vidi ĝin malkaŝe. Kaj kiam li vidas ke al tio li perdus tempon por nenio, li ĉesas rigardi kaj atentas la servon kiun la noblulo estis komencinta.

## Nekutima Diservo

Et quant vint a cel point que li prestres volt lever le cors Nostre Seignor, si se dreça en son lit en seant cil qui se gisoit et descovri son vis. Et ce ert uns hons molt anciens et vielz et chanuz, et ot une corone d'or en sa teste et ot les espauls nues et descubertes et tout ce devant jusqu'au nombril. Et quant Perceval le resgarde, si voit qu'il a le cors plaié et navré et les paumes et les braz et le vis.

Kaj kiam venis tiu momento kiam la pastro estis tuj levonta la korpon de Nia Sinjoro [t.e. hostion], tiam malkuŝigis sidanten en sia lito tiu kiu kuŝis, kaj li malkovris sian vizaĝon. Kaj li estis viro tre maljuna kaj olda kaj blankhara, kaj li havis kronon el oro sur sia kapo, kaj havis la ŝultrojn nudaj kaj nekovritaj, same kiel ĉion malsupren ĝis la umbiliko. Kaj kiam Percevalo rigardas lin, li vidas ke tiu ĉi havas la korpon kontuzita kaj vundita, same kiel la polmojn kaj la brakojn kaj la vizaĝon.

1/ Varianto : *dedenz*, "enen" anst. "malantaŭ la pastron".



## VIII – Iu misterplena abatejo...

Et quant ce avint que li prestres mostra apertement le cors Jhesucrist, il tendi les mains encontre et comença a crier : *"Biaus douz peres, ne m'oubliez mie de ma rente !"* ne puis ne se volt recoucher, ainz fu adés en proieres et en oroisons, et ot ses mains drechiees vers son creator et ot toutevoies la coronne d'or en son chief.

Longuement resgarda Perceval l'ome qui ou lit seoit ; car trop li semble mesaiesiez por les plaies que il a ; si le voit si viel par semblant qu'il cuide bien qu'il ait trois cenz anz ou plus d'aage. Et il le resgarde toz dis, car il tient ceste chose a trop grant merveille.

Si voit, quant la messe fu chantee, que li prestres prist entre ses mains *Corpus Domini*<sup>2</sup> et le porta a celui qui gisoit ou lit et li dona a user. Et maintenant qu'il l'ot receu, il osta sa coronne de sa teste et la fist metre desus l'autel ; et il se recoucha en son lit ausi come il ert devant, et fu couverz si qu'il ne paroit riens de lui. Et maintenant se deves-ti li prestres come cil qui avoit la messe chantee.

Kaj kiam okazis ke la pastro malkaŝe montris la korpon de Jesukristo, tiu etendis la manojn al ĝi kaj komencis laŭtege peti : *"Bela dolĉa Patro, min ne forgesu pri redono al mi !"* ; poste li ne volis rekuŝiĝi, sed daŭrigis petegi kaj preĝi, kaj li havis siajn manojn levitaj al sia kreinto kaj li tamen havis la kronon el oro sur sia kapo. Longe Percevalo rigardis la viron kiu sidis sur la lito ; ĉar tiu ŝajnas al li ege suferanta pro la vundoj kiujn li havas ; kaj li vidas lin tiel maljuna laŭ la aspekto, ke li bone kredas ke li havas tricent jarojn aŭ pli da aĝo. Kaj li rigardaŝ lin daŭre ĉar li tenas tion grandega mirindaĵo. Kaj li vidas, kiam la meso estis [fin]kantita, ke la pastro prenis inter siajn manojn *Corpus Domini*<sup>2</sup> kaj portis ĝin al tiu kiu kuŝis en la lito kaj donis ĝin por manĝi. Kaj tuj post kiam tiu ĉi ricevis ĝin, li demetis sian kronon de sur sia kapo kaj metigis ĝin sur la altaron ; kaj li rekuŝiĝis sur la lito tiel kiel li antaŭe estis, kaj estis kovrata tiel ke vidiĝis nenio el li. Kaj tuj la pastro alivestiĝis kiel iu kiu estas [fin]-kantinta la meson.

### Promeso de klarigo

Quant Perceval ot veue ceste chose, si issi dou mostier et vint en la chambre ou il avoit geu, et apela un des freres de laienz et li dist : *"Sire, por Dieu dites moi ce que je vos demanderai : car je cuit bien que vos en sachiez la verité."*

– *"Sire chevaliers, fet cil, dites moi que ce est, et se je le sai je le vos dirai volentiers, se je le puis fere ne doi."*

– *"Par foi, fet il, je vos dirai que ce est. Je fui ore en cele eglyse et oï le servise ; et la vi je en unes prones devant un autel gesir en un lit un viel home de tres grant aage, une coronne d'or en sa teste. Et quant il se dreça en seant, je vi qu'il estoit toz plaiez amont et aval. Et apres ce que la messe fu chantee li dona li prestres a user Corpus Domini<sup>2</sup>. Et maintenant qu'il l'ot usé se coucha et osta sa coronne de sa teste. Biau sire, ce me semble que ce soit mout grant senefiance ; si le voldroie molt savoir s'il pooit estre ; et por ce vos pri je que vos le me dioiz."*

– *"Certes, fet li preudons, volentiers."*

2/ Latinaĵo : la "Korpon de la Sinjoro".

Post kiam Percevalo vidis tion, li eliris el la preĝejo kaj venis en la ĉambron kie li estis kuŝinta, kaj li vokis unu el la tieaj fratuloj kaj diris al li : *"Sinjoro, pro Dio, diru al mi kion mi petos : ĉar mi bone kredas ke pri tio vi scias la veron."*

– *"Sinjoro kavaliro, tiu ĉi respondis, diru al mi kio tio estas, kaj se mi scias tion, mi volonte diros ĝin al vi, se mi tion povas fari, kaj rajtas."*

– *"Per mia fido, Percevalo respondis, mi diros al vi kio tio estas. Mi ĵus estis en tiu preĝejo kaj aŭdis la [di]servon ; kaj tie mi vidis en kradfermito antaŭ altaro tre multjaran maljunulon kuŝantan en lito, kun ora krono sur la kapo. Kaj kiam li suprensidiĝis, mi vidis ke li estas tute kontuzita supre kaj malsupre. Kaj post kiam la meso estis [fin]-kantita, la pastro donis al li Corpus Domini<sup>2</sup> por manĝi. Kaj tuj kiam tiu ĉi manĝis ĝin, li kuŝiĝis kaj forprenis sian kronon de sia kapo. Bela sinjoro, ŝajnas al mi ke tio havas tre grandan signifon, kaj mi multe ŝatus ekscii tiun, se eblus ; kaj pro tio mi petas vin ke vi diru tiun al mi."*

– *"Certe, la noblulo respondis, volonte." □*

**Eraroj** : En n-ro 19, p. 19, kol. 1, l. –8 (oka linio retroen ekde la fino), korektu Parceval per : Perceval. En n-ro 19, p. 19, k. 2, l. 23 kaj 32, korektu armilaron per : armaĵon. En n-ro 15, p. 15, lastlinie (klarigo de la bildo), ne temas pri Galado sed pri Lanceloto (la bildo estas ilustraĵo de la rakonto en n-ro 18 p. 21).

# Preskaŭ mil el la *Prologo* de "nia sankta Di- al du asertoj kaj

- "Kristanaj teologoj, dum multaj jarcentoj, deklaris ĉiujn nekristanojn herezuloj kondamnitaj al infero." (Bernhard Westerhoff, en n-ro 20, p. 10)
- "Ĉu homo sukcesus eliri el tiu plano [de Dio, kiu enigas homon al supernaturo] ? Li ne sukcesus ĉar ne ekzistas alia plano (...) Tiupunkte mi devus demonstri ke **tia deklarita doktrino estas reale kristana doktrino. Sed tio troveblas en sennombraj verkoj pri kristana teologio en la franca, itala, hispana, germana, angla... kaj latina.**" (A. Zecchin, en n-ro 20, p. 9)

Petro la Damaskano plej verŝajne vivis en la komenco de XI-a jc.<sup>1</sup>, do en la tempo de la ankoraŭ *Nedividita Eklezio*, t.e. antaŭ la tuj posta *Orienta Skismo*, en 1054, kiam apartiĝis katolikismo disde ortodoksismo. (Lia verko troviĝas en la greka *Φιλοκαλία* : *Filokalia*.)

Mi mem ne posedas unu libron nek iam posedis unu sed, kiel ĉiun kontentigaĵon de la korpaj bezonoj, mi ricevis tiujn skribaĵojn de la fideluloj kiuj amas la Kriston ; mi atente tralegis ilin kaj ilin redonis (...)

Tiel mi povis (...) vidi ĉu ĉio kion oni deziras entrepreni aŭ kion oni diligentas fari, savas aŭ ne ; kaj **kia estas tiu io kiun ĉiuj serĉas** ; kaj kiel la antikvuloj kaj la nuntempuloj plaĉis al Dio, en la riĉeco kaj la malriĉeco, en la svarmo de la pekuoj kaj en la dezerto, en la edzeco kaj la virgeco, kaj por ĉion diri, kiel en ĉiu loko kaj en ĉiu tempo, ni trovas la vivon kaj la morton, la savon kaj la perdiĝon. (...) En ĉiuj situacioj ni trovas homojn kiuj saviĝas, kaj aliajn kiuj perdiĝas.

## La problemo de la malbono

Kaj ne nur tion mi admiris, sed ankaŭ kiel (...) la bona Dio, kiu superas ĉian bonecon, akceptis, en sia granda kompatato, ke okazu en la mondo tiom da tiel diversaj tentoj kaj turmentoj. Li volis konsenti tiujn ĉi por ke ili estu kvazaŭ la penoj de la pentito, mi volas paroli pri malsato, soifo, (...) mortotimo, (...) sufero, defalo, malĝojo, angoro, animsufokado en la ĉi-mondo (...) ; kaj ankaŭ la danĝeroj en la mondo, la ŝippereoj, ĉiuj eblaj malsanoj, (...) la tertremoj, la malsatego, la inundoj, la antaŭtempaj mortoj, ĉiaj malfeliĉoj kiuj okazas al ni kontraŭ nia volo, kaj kiujn Dio konsentis.

Sed estas malbonaĵoj kiujn Dio ne volas, kaj kiuj venas de ni kaj de la demonoj, ekzemple (...) la multaj formoj de la peko (...) ekde la frenezo ĝis la malespero, (...) la militoj, (...) la kalumnioj, ĉiaj suferoj kiujn ni volonte afliktas al ni mem kaj kiujn ni afliktas al la aliaj, kaj kiujn Dio ne volas.

Kaj [mi] ankoraŭ [admiris] kiel meze de tiom da malbonaĵoj, neniu el ili povis malebligi ke multaj [homoj] estu savitaj. Ankaŭ multaj perdiĝis, kontraŭ la volo de Dio.

Ĉiujn tiujn ĉi punktojn de la diaj Skriboj kaj ankaŭ multajn aliajn mi malfacile komprenis. (...) Sed la graco respondis al la deziro de miaj demandoj. Kaj mi trovis ĉe la sanktaj Patroj la distingivon.

## Libereco de la homo

La principo de ĉia bono estas la natura kono kiu estas donita al ni de Dio mem, aŭ de la Skriboj pere de homo (...) ; aŭ ankaŭ (...) kion ni ankaŭ nomas la konscienco. (...) **Post la kono venas la libera decido de la homo.** Ĝi estas la principo de la savo : la homo forlasas siajn proprajn volojn kaj siajn proprajn pensojn, kaj plenumas la pensojn kaj la volojn de Dio.

Kaj se li povus plenumi ilin, ne estus en la tuta kreitaro unu aĵo, unu ago, unu loko kapablaj malebligi kio Dio volis ke li estu ekde la komenco : estaĵo laŭ Lia bildo kaj simileco, kaj dio per adopto, laŭ la graco, senpasia, justa, bona kaj saĝa, sendepende ĉu li estas riĉa aŭ malriĉa, ĉu li vivas en virgeco aŭ edzeco, ĉu li havas la povon kaj la liberecon [aŭ] li estas servutulgita kaj sklavo, mallonge : en ĉiu tempo, en ĉiu loko, en ĉio.

## Justaj nekristanoj

Tial oni trovas multajn justulojn tiom antaŭ la [Mosea] leĝo kaj sub la leĝo, kiom en la ordo de la graco [t.e. ĉe la baptitoj]. Ĉar ĉiuj [justuloj] preferis la konon de Dio kaj lian volon, al sia propraj pensoj kaj siaj propraj volo (..)

# jara respondo

## portanta Patro Petro la Damaskano"

### kelkaj aliaj demandoj

Tiel estas. La lokoj kaj serĉadoj tamen estas malsamaj. Kaj oni devas povi distingi, aŭ per la humileco donita de Dio, aŭ pridemandante tiujn kiuj havas la spiritajn donacojn de la distingopovo. Ĉar (...) kiam oni lernis el la distingopovo, kion oni volas fari el sia propra povo, **la afero komencas plaĉi al Dio.**

Tamen, kiel ni jam diris, oni devas forlasi en ĉio siajn proprajn volojn, por atingi la dian celon, tie kien Dio volas ke oni iru kiam oni serĉas. (...)

#### Nealtrudiĝa lumo

Se ni ne akceptas ĝin, la [dia] parolo cedigas neniun el ni. Sed ĝi estas **kiel la suno kiu sendas siajn radiojn kaj lumigas la tutan mondon.** (...) **Kiu ne volas vidi ĝin, tiu ne estas devigata.** Neniu estas senigita je la lumo, krom de si mem se li ne volas vidi ĝin. Ĉar Dio faris la sunon kaj la okulon. Kaj la homo havas la povon kontempli.

Same estas ĉi tie. Sur ĉiujn Dio sendas, kiel radiojn, la lumon de la konoj. (...) Kiu elektas ricevi per la fido la certan konon, tiu gardas la memoron pri ĝi per la agoj. Kaj Dio donas al li ĉiam pli da bonvolo, da kono kaj da forto. Ĉar el la natura kono, en tiu kiu elektas ĝin, naskiĝas la bonvolo. El la bonvolo venas la forto agi. (...)

De tiam tia homo volas absolute nenion krom la volon de Dio. Tiun ĉi pasantan vivon li forlasas kun ĝojo, pro la amo al Dio kaj al la proksimulo. Ĉar li ricevas la saĝon kaj la adopton. Kaj la Sankta Spirito restadas en li. (...) Unuvorte, **la graco faras el li dion per adopto.** Li ricevas la antaŭpagojn de la trans[mond]a beateco, kiel diris Gregorio la [Nazianza] Teologo (...)

**La kono venas kiel la suno.** Pro nekredemo, aŭ pro pigremo, la sensenculo volas fermi la okulojn, tio estas la decidemon. La inerteco, kiu venas de la neglektemo, tuj forgesigas al li la konon.

Ĉar de la sencomanko venas la neglektemo, de kie [venas] la inerteco, de kie la forgeso, de kie la egoismo, kiu estas la amo al niaj propraj volo kaj al niaj propraj pensoj, la amo al la plezuroj, kaj kion oni nomas la amo al la vana gloro.

De kie, la amo al la mono, la radiko de ĉiuj malbonoj. De kie, la distriĝo en la aferoj de la vivo. De kie, le kompleta nescio pri la donacoj de Dio. (...)

#### Libera elekto

La homo tiel estas ĉe la kruciĝo de tiuj du vojoj, t.e. la justeco kaj la peko. Li ekiras sur la vojo kiu li volas, kaj li sekvas ĝin. De tiam la vojo kiu akceptas lin kaj tiuj kiuj kondukas lin sur ĝi – aŭ la anĝeloj kaj la homoj de Dio, aŭ la demonoj kaj la homoj de malbono – , kondukas lin ĝis ĝia fino, eĉ se li ne volas. (...)

Kiu laboras al la bono devas do redoni gracon al Dio kiu donis ĉion al ni post la estado. Sed kiu elektas kaj faras la malon, tiu rigardu sin sola respondeculo. Ĉar **neniu povas trude altiri lin ĉar Dio kreis lin libera.** Li estos inda je la laŭdoj de Dio kiam Dio vidos lin preferi la bonon laŭ sia tuta volo. (...)

#### Senbedaŭraj donacoj de Dio

La treege bona Dio ne devigas nin por ke, trudpelitaj kaj malobeemaj, ni ne meritu pli grandan kondamnon. Kiu donacis en ĉia bono la liberecon, tiu ne forprenas ĝin de ni. Sed kiu volas fari la bonon, tiu petu Dion per la preĝado, kaj li tuj ricevos la konon kaj la *kapablon*<sup>2</sup>.

Ni povu vidi ĉi tie en malmultaj vortoj, pro la naturo mem de la aĵoj, ke nenio, **nek tempo nek loko nek agado povas esti baro sur la vojo** de homo kiu volas esti savita, kondiĉe ke li streĉu mem ĉiun penson, kiel taŭgas kaj kun distingopovo, al la dia celo. Ĉar ne estas neceso en kio okazas. Ĉio venas de tiu per kiu la aferoj alvenas. □

1/ "Nikodemo la Sankta-Montano\* identigas Petron la Damaskanon kun Petro, episkopo de Damasko ĉ. 775, mortinta estiel martiro en Arabio. (...) Sed tia identigo estas kontraŭdirita de la datadoj de du malnovaj manuskriptoj de [la verko de] nia aŭtoro, kiuj situigas lin, unu en la XII-a jc., la alia en la XI-a. (...) Eble, kiel tion proponas Patro Dumitru Staniloae, oni pravos datante Petron la Damaskanon el la [komenco ?] de la XI-a jc., post Simeono la Tradukisto (dua duono de la X-a jc., kaj citita de Petro la Damaskano), sed antaŭ ol povis radii ĉien en la Oriento la atesto kaj la ekzemplo de Simeono la Nova Teologo (949-1022)". (O. Clément)

\* *Hagioritos* : "la 'Αγιον Ορος-ano" (*Hagion Oros*, la *Sankta Monto* : ankoraŭ nun "monaĥa federacia respubliko" sur 60-km longa duoninsulo, la *Atos-Monto*, oriente de Grekio), kompilinto de la Φιλοκαλία, 1782.

2/ Δυναμις (*Dynamis*) : (ĉi tie) "fakultato de la animo, kapabla je la movo el la kreita al la nekcreita".

## Daŭrigita dialogo pri "Supereco de religio ?"

Tre estimata samideano, 13-1-1998 [fakse]

Leginte vian noton fine de p. 12 en n-ro 20 kaj vian demandon "ĉu bahaismo kapablis solvi la stariĝitan problemon de absorbo de la antaŭa kaj malaprobo de la posta" revelacio dia, mi deziras respondi ke Bahá'u'lláh klare asertis la jenon : certe venos post Li nova profeto por gvidi la homaron, sed ne antaŭ la pasado de minimume mil jaroj.

Vi povas legi la originalajn tekstojn en la *Kitáb-i-Aqdas* ("La plej Sankta Libro", verso 37 kaj noto 62). Sekve de tio, la bahaanoj **NUN** ne povas "aprobi" iun ajn "revelacion" novan.

Tutsamideane via **Eric Coffinet**

– Do, almenaŭ teorie, la bahaanoj, kvankam laŭ B. Westerhoff "teologio de progresanta revelacio (...) estas (...) plene ellaborita nur en Bahaismo" (sl.), ŝajnas multe pli **fermitaj** al eventuala nova revelacio – por ankoraŭ sufiĉe multaj generacioj ! – ol kristanismo kies skribo asertas ke Jesuo diris : "Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron ; ĉar li parolos ne de si mem ; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos (...). Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi..." (Johano 16,12-14)

Torino 15. 11.1997

Tre estimata direktoro de *Asistilo*.

Mi ĝenas vin por esprimi mian opinion pri la propono de Bernhard Westerhoff (20 p. 10-13), kiu subtenas ke ĉiu religio devu **rezigni** sian konvinkon **pri ĝia supereco rilate la aliajn**. El tiu konvinko, kune kun aliaj similaj, devenus la luktoj por la superrego inter religioj, kiuj sangobanis la historion kaj kiuj ankoraŭ kausas disiĝojn kaj malamikecojn kaj eĉ militojn. Kaj kiel malpravigi lin ? La historio eksaltas por elmontri la tristan okazintaĵon.

Tamen la propono, laŭ mi, ne tro persvadas pro ĝia suspekta kontraŭnatura karaktero pro tio ke ĝi **kontraŭas elementan leĝon de la homa psikologio** kaj de la racio. Kaj tial ĝi ekscitus novajn disiĝojn ene de la unuopaj religioj.

Se iu fakte sekvas aŭ decidas sekvi religion anstataŭ alian, kial li tion faras ? ĉu eble opiniante ke la aliaj religioj estas egale veraj ? Se li havus tiajn konvinkojn oni ne vidas kial li daŭre persistu en sia propra. **Se li ne taksus la propran supera** (termino tre nepreciza : supera rilate kion ? ĉu eble pli *fondita historie* ? ĉu eble *pli riĉa je aliĝintoj*, eble *pli favora al la postuloj de homo*, aŭ kiu scias kion ? Sed la diferencoj ne gravas) li havus neracian sintenon pro tio ke li sekvas ion ne

sufiĉe motivitan : kio ne povas daŭri sen damaĝi lian psikon aŭ **transiri en iun sinkretismon kiu alinaturigos ĉiun religion**. Kaj celi al tio, laŭ mi, estas provoki negativajn reagojn endanĝerigontajn la dialogon mem inter religioj.

**Kial ne respekti tiun konvinkon ?** Ĉu vere de ĝi *necese* sekvas luktoj, aŭ ĝin ni bezonas taksuri nur [ebla] kaŭzo de [eventualaj] luktoj ?

Mi ne vidas nepran ligon inter tiu konvinko kaj malamaj luktoj. Necesas anstataŭe anonci kaj insisti sur **alia principo** – kaj ĝin igi efika – , la jena : *malgraŭ via konvinko ke via religio estas supera* (ĉiam tiu termino !), *vi devas respekti tiujn kiuj havas la saman konvinkon pri sia religio malsama de la via*. Kaj do ni devas stimuli por ke el eno de ĉiu religio emerĝu tiuj karakterizoj doktrinaj kiuj altrudas respekton al aliulaj konvinkoj pri supereco de propra religio. Kaj se tiuj ne troviĝas, oni agu por ke ili fariĝu heredaĵo de ĉiuj. Mi opinias ke, se oni analizus atente tiujn trajtojn, kvankam mergitajn de la egoismo kaj de la ambicioj (kaj de aliaj psikaj kompleksoj, pli aŭ malpli kulpaĵ), ĝuste tiuj karakterizoj feliĉe elmienus.

Mi povas pri tiu temo diri ion pri kristanismo. Jam fariĝis doktrino en ĉiuj oficialaj dokumentoj de la kristanaj eklezioj la principo : *ĉiuj homoj estas vokitaj kredi en Jesuo Kristo ; sed jam apartenas al Kristo* (= vivas jam kun Kristo) *kiu ajn simple sekvas sian propran konsciencon\**, *eĉ se tiu ĉi honeste enviciĝas inter la kontraŭantoj de kristanismo. La peko envere komencas sin prezenti kiam pro egoismo kaj aliaj malvirtoj, iu iras kontraŭ sian konsciencon.*

Ankaŭ tiu kristana principo estis konkerita tra luktaj disputoj, kvankam ĝi estas eltirebla ĝuste de la novtestamentaj dokumentoj, kiel la paŭla letero al Romanoj.

**Armando Zecchin**

P.S. En la disketo estas ankaŭ entenata (...) "La fundamentoj de la kristanismo", **libro** de mi tradukita **esperanten** kaj presota en la venontaj monatoj...

– Kiel ilustraĵo de via trafa rimarko pri psikologio, jen **rakonteto**, aplikebla al la religianoj ?

Virino ĵus fariĝis patrino. Flegistino montras al ŝi la novnaskitan bebon. La patrino, kies unua infano li estas, rave ekkrias : "Li estas la plej bela en la tuta mondo !" La akuŝistino, ridetanta, milde respondas : "Jes ja, sinjorino ! ...**kial ĉiuj aliaj.**"

\* Mi ne tre ŝatas la esprimon *apartenas al Kristo* pri nekristanoj : tio ŝajnas "akaparo" de la aliuloj. Oni ne provu kristanigi la aliajn sed respektu ilian diferencon. Vidu sur la antaŭa paĝo tradician uzon de pli neŭtrala vorto, **justuloj**, pri alireligianoj. □

## Dio, la ununura *Mi*

Se mi bone komprenas Vjâsa-on<sup>1</sup>, oni devus pensi ne "mi vidas" aŭ "mi komprenas" sed, sen-persone, "io estas vidata (aŭ komprenata) per tiu ĉi intelekto", aŭ eĉ, prefere : "Dio vidas (aŭ komprenas) per tiu ĉi intelekto". Kompreneble, tio tute ne signifas ke mi estas Dio sed male, ke "mi" tute simple estas nenio : nek tiu ĉi korpo nek tiu ĉi intelekto kiu pensas. Anstataŭ "*mi pensas do mi estas*" oni devus diri nur "estas pensado, do estas io".

Kio ? Dio, respondas la aŭtoro (...kiu do estas nenio alia ol Dio mem !)

### Komentario de hindu-katoliko

Jen ankaŭ kiamaniere tion komprenas la benedikta Dom Le Saux, kiu fariĝis *sannjâsi*-o antaŭ preskaŭ duonjarcento kun la nomo **Sŭami Abhi-ŝiktânanda** : "la Majstro [kiu trovas sian] feliĉon en la Aspergita" (sanskrita ekvivalento de la greka Χριστος : *Hristos*).

« La monaĥo estas pasinta trans la *mi* ; li estas pasinta trans la *mia*-n (...) Mergita en la sino de la *Saĉĉidânanda* – tiu Dio (Tauler diras "la Dieco") kiu samtempe estas "Esto, Saĝo, Feliĉo" – , fariĝinte mem puraj esto, saĝo kaj feliĉo, la *ĝnânî* de tiam estas, kaj en sia korpo kaj en sia spirito, nur pura manifestiĝo de la eterna Mem : *Spiritu Dei agitur* (la Spirito de Dio animas lin), la tiel impresa formulo de sankta Paŭlo, povus servi kiel komento.

**Liaj fakultoj**, kaj eksteraj kaj mensaj, **fariĝis nur rektaj iloj en la servo de la Spirito**, de la *Puruŝottama*, tiel ke, de tiam, ne plu estas relajso, kaj do potencialperdo kiu revenigus al aparta individua subjekto, al la supraĵa konscio de si (*aham-kâra*). Ĉu ne estas en la Realo (*sat, satjam*) ununura konanto, ununura volante, ununura amanto, ununura ĝuanto (...) ?<sup>2</sup>

Kian sencon havas diri "Mi" (...) Ĉu *aham* ne implicas absolutecon, sendependencon, memsufiĉon, kompletan memstarecon kaj liberecon ? (...) Ĉu ne Dio sola estas rajtigita diri "Mi" ? *Ego Dominus* [Mi, la Sinjoro]. Kaj kiam la homo diras "mi, *aham*", ĉu tio ne estas uzurpo ? Aŭ pli ĝuste, en la "mi" kiun li diras, la homo samtempe uzurpas kaj pravas la dian."<sup>3</sup> »

1/ Tio ĉi estas memstarigita noto 12, vidu p. 25.

2/ El *Guhântara*, verkita en 1953 aŭ 1954 ĉe Saĉĉidânanda Aŝramo en *Ŝântivanam* (la "Pac-arbaro") (vidu 14 p. 11) ; en *Intériorité et révélation : Essais théologiques*, Sisteron : eld. Présence, 1982, p. 64-65.

3/ 'Ehjeĥ 'aŝer 'ehjeĥ. *Ego sum qui sum* [Mi estas kiu Mi estas] (*Eliro 3,14*), samlibre p. 82.

## Iniciato por Unuiĝinta Religiaro Deklaro de Subteno

Mi, \_\_\_\_\_, subskribas kaj subtenas la ideon fondi Unuiĝintan Religiaron kiel konstantan forumon kie ĉiuj religioj kunvenu por utili al la bono de ĉia vivo. Mi kredas ke la mondo profitos el kreskanta kompreno kaj kunlaborado inter religioj, kaj mi kuniĝas en la espero ke daŭranta dialogo inter la religioj kaj kred-tradicioj de la mondo estos gravega por solvi demandojn kiuj koncernas ĉiujn kunloĝantojn de nia planedo.

Mi akceptas la inviton kuniĝi en la Iniciato por la Unuiĝinta Religiaro. Mi konsentas antaŭenigi la realigadon de ties antaŭvidon en la mondo, min devigontigante jene : *(Bonvolu krucmarki la devigontiĝojn kiujn vi nuntempe kapablas fari.)*

1. Preĝi por la kresko de la antaŭvidado de la Unuiĝintaj Religioj kaj la fondo de Unuiĝinta Re-ligiaro en la jaro 2000.

2. Partopreni en tiu ĉi antaŭvidado kun amikoj kaj fremduloj en mia mondregiono. Mi tion ĉi fa-ros laŭ jenaj specifaj manieroj :

3. Propone prezenti ideon aŭ revon kiun mi ŝatus vidi realigita en la Iniciato por la Unuiĝinta Religiaro. Mia revo estas :

4. Finance kontribui (ĉiaj donacoj estos bonve-naj : de unu gld. ĝis unu milion da) por helpi financi 10 kunvenojn en la tuta mondo, ŝtupojn al la 3-a monda konferenco en junio 1998, verkanta unuan provaĵon de Ĉarto de la Unuiĝinta Religiaro ; kaj por oficejo kunordigonta la kreskantan agadon.

5. Sendi miajn nomon, adreson, kaj la *Deklaron de Subteno*, tiel ke mi estu registrita kiel membro de la Iniciato por la Unuiĝinta Religiaro, kaj daŭre informata pri ties progreso.

Nomo :

Membreco :

Adreso :

Telefono :

Telefakso :

ret-poŝta adreso

**Bonvolu sendi al** : Iniciato por Unuiĝinta Religiaro  
P.O. Box 29242

Presidio Building # 1009, First Floor  
San Francisco, CA 94129-0242, USA

Telefono : +1 415 561-2300, Faksilo : +1 415 561-2313

Elektronika adreso : [office@united-religions.org](mailto:office@united-religions.org)

Inter-rete : <http://www.united-religions.org>

# Jogosutro de Patañjali :

II  
साधन पादः

तपःस्वाध्यायेश्वरप्रणिधानानि क्रियायोगः ।  
समाधिभावनार्थः क्लेशतनूकरणार्थश्च ।  
अविद्यास्मितारागद्वेषाभिनिवेशाः क्लेशाः ।  
अविद्या क्षेत्रमुत्तरेषां प्रसुप्ततनुविच्छिन्नोदाराणाम् ।

sādhana pādah

tapah-svādhyāyêśvara-pra-ṇidhānāni kriyā-yogaḥ // 1 //  
samādhi-bhāvanārthaḥ kleśa-tanū-karaṇārthaś ca // 2 //  
a-vidyāsmitā-rāga-dveṣābhiniveśāḥ kleśāḥ // 3 //  
a-vidyā kṣetram uttareṣām prasupta-tanu-vicchinnôdārāṇām // 4 //

उद्दिष्टः समाहितचित्तस्य योगः । कथं व्युत्थित-  
चित्तोऽपि योगयुक्तः स्यादित्येतद्वारम्यते । तपः-  
स्वाध्यायेश्वरप्रणिधानानि क्रियायोगः । नातपस्विनो  
योगः सिध्यति । अनादिकर्मक्लेशवासनाचिन्त्रा  
प्रत्युपस्थितविषयजाला चाशुद्धिर्नान्तरेण तपः संभेद-  
मापद्यत इति तपस उपादानम् । तच्च चित्तप्रसाद-  
नमबाध्यमानमनेनासेव्यमिति मन्यते ।

स्वाध्यायः प्रणवादिपवित्राणां जपो मोक्षशास्त्रा-  
ध्ययनं वा । ईश्वरप्रणिधानं सर्वक्रियाणां परमगुरा-  
वर्षणम् । तत्फलसंन्यासो वा ॥ १ ॥

स हि क्रियायोगः—समाधिभावनार्थः क्लेशतनू-  
करणार्थश्च । स ह्यासेव्यमानः समाधिं भावयति,  
क्लेशांश्च प्रतनूकरोति । प्रतनूकृतान्क्लेशान्प्रसंख्या-  
नाग्निना दग्धबीजकल्पानप्रसवधर्मिणः करिष्यतीति ।

तेषां तनूकरणात्पुनः क्लेशरपरामृष्टा सत्त्व-  
पुरुषान्यतामात्रख्यातिः सूक्ष्मा प्रज्ञा समाप्ताधिकारा  
प्रतिप्रसवाय कल्पयिष्यत इति ॥ २ ॥

अथ के क्लेशाः कियन्तो वेति? अविद्यास्मिता-  
रागद्वेषाभिनिवेशाः क्लेशाः । क्लेशा इति पञ्च-  
विपर्यया इत्यर्थः । ते स्पन्दमाना गुणाधिकारं दृढयन्ति  
परिणाममवस्थापयन्ति कार्यकारणस्रोतमुन्नमयन्ति  
परस्परानुग्रहतन्त्रीभूत्वा कर्मविपाकं चाभिनिर्हरन्ति  
॥ ३ ॥

अत्राविद्या क्षेत्रं प्रसवभूमिरुत्तरेषामस्मिता-  
दीनां चतुर्विधकल्पानां प्रसुप्ततनुविच्छिन्नोदाराणाम् ;  
तत्र का प्रसुप्तिः? चेतसि शक्तिमात्रप्रतिष्ठानां बीज-  
भावोपगमः । तस्य प्रबोध आलम्बने सम्मुखीभावः ।  
प्रसंख्यानवतो दग्धक्लेशबीजस्य सम्मुखीभूते-  
प्यालम्बने नासौ पुनरस्ति । दग्धबीजस्य कुतः  
प्ररोह इति । अतः क्षीणक्लेशः कुशलेश्वरमदेह  
इत्युच्यते । तत्रैव सा दग्धबीजभावा पञ्चमो  
क्लेशावस्था नान्यत्रेति । सतां क्लेशानां तदा बीज-  
सामर्थ्यं दग्धमिति । विषयस्य सम्मुखीभावेऽपि सति  
न भवत्येषां प्रबोध इत्युक्ता प्रसुप्तिर्दग्धबीजानां  
चाप्ररोहश्च ।

तनुत्वमुच्यते, प्रतिपक्षभावनोपहृताः क्लेशास्त-  
नवो भवन्ति ।

सर्व एवामी क्लेशा अविद्याभेदाः । कस्मात्?  
सर्वेष्वविद्यां वाभिप्लवते । यद्यदविद्या वस्त्वाकार्यते  
तदेवानुशरते क्लेशा विपर्यासप्रत्ययकाल उपलभ्यन्ते  
क्षीयमाणां चाविद्यामनुक्षीयन्त इति ॥ ४ ॥

uddiṣṭaḥ samāhita-cittasya yogaḥ / katham vy-ut-thita-citto  
'pi yoga-yuktaḥ syād ity etad ārabhyate / tapah-svādhyāyêśvara-  
pra-ṇidhānāni kriyā-yogaḥ / nātapasvino yogaḥ sidhyati / an-ādi-  
karma-kleśa-vāsanācittā pratyupasthita-viṣaya-jālā cāśuddhir nān-  
tareṇa tapah sambhedam āpadyata iti tapas upādānam / tac ca  
citta-prasādanam abādhyamānam anenāsevyam iti manyate /  
svādhyāyaḥ praṇavādi-pavitraṇām japo mokṣa-śāstrādhyā-  
yanaḥ vā / Īśvara-pra-ṇidhānaḥ sarva-kriyāṇām parama-gurāv  
arpaṇam / tat-phala-saṃnyāso vā // 1 //

sa hi kriyā-yogaḥ – samādhi-bhāvanārthaḥ kleśa-tanū-ka-  
raṇārthaś ca / sa hy āsevyamānaḥ samādhiḥ bhāvayati kleśāś  
ca pra-tanū-karoti / pra-tanū-kṛtān kleśān prasamkhyānāgninā  
dagdha-bīja-kalpān a-prasava-dharmināḥ kariṣyatīti /

teṣāṃ tanū-karaṇāt punaḥ kleśair a-parāmṛṣṭā sattva-pu-  
ruṣānyatā-mātra-khyātiḥ sūkṣmā prajñā samāptādhikārā prati-  
pra-savāya kalpayiṣyata iti // 2 //

atha ke kleśāḥ kiyanto vēti ? a-vidyāsmitā-rāga-dveṣābhi-  
niveśāḥ kleśāḥ / kleśā iti pañca-viparyayā ity arthaḥ / te spanda-  
mānā guṇādhikāraṃ dṛḍhayanti pariṇāmam avasthāpayanti  
kārya-kāraṇa-srotam unnamayanti paras-parānugraha-tantrī-  
bhūtvā karma-vipākaṃ cābhi-nir-haranti // 3 //

(...) atrāvidyā kṣetram prasava-bhūmir uttareṣām asmi-  
tādīnām catur-vidha-kalpānām prasupta-tanu-vicchinnôdārā-  
ṇām / tatra ko prasuptiḥ ? cetasi śakti-mātra-pratiṣṭhānām bīja-  
bhāvôpagamaḥ / tasya pra-bodha ālambane sammukhī-bhāvaḥ /  
pra-samkhyāna-vato dugdha-kleśa-bījasya sammukhī-bhūte 'py  
ālambane nāsau punar asti / dugdha-bījasya kutaḥ praroha iti /  
ataḥ kṣīṇa-kleśaḥ kuśalāś carama-deha ity ucyate / tatraiva sā  
dugdha-bīja-bhāvā pañcamī kleśāvasthā nānyatrēti / satām kleśā-  
nām tadā bīja-sāmarthyam dagdham iti / viṣayasya sam-mukhī-  
bhāve 'pi sati na bhavaty eṣām prabodha ity uktā prasuptir dag-  
dha-bījānām cāprarohaś ca /

tanutvam ucyate pratipakṣa-bhāvanôpahatāḥ kleśās tanavo  
bhavanti / (...)

sarva evāmī kleśā a-vidyā-bhedāḥ / kasmāt ? sarveṣv  
a-vidyaivābhiplavate / yad yad a-vidyayā vastv ākāryate tad  
evānuśerate [?] kleśā viparyāsa-pratyaya-kāla upalabhyante  
kṣīyamāṇām cāvidyām anu-kṣīyanta iti // 4 //

## II – Ĉapitro de la plenumado

( Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj )

1. La Jogo de la ago, aŭ *Kriyâ-Yogaĥ*, konsistas el tri neapartigataj aktoj : daŭra klopodo, interna konscio pri si mem, kaj sindono al la Supera Animo (Īsvara).
2. Tiu jogo celas : mildigi la kaŭzojn de sufero, kaj ebligi la *Samâdhi*-staton.
3. Nescio, egoismo, deziro akiri, rifuzo akcepti, alligiteco al la vivo, kaŭzas suferon.
4. De nescio pri la realo rezultas la aliaj kaŭzoj de sufero, kreskantaj aŭ ankoraŭ dormantaj.

( Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito )

1. Asketado—studado—[sin]dediĉo al la Sinjoro, [jen kio estas] la Agad-Jogo [*Krijâjoga*],
2. havanta kiel celon la estigon de la absorbiĝo kaj la malfortikigon de la turmentoj.
3. Nescio, mi-konscio, deziro, malamo kaj alkroĉiĝemo [al la vivo ?] estas la turmentoj.
4. La nescio [estas la] kampo de la sekvaj [turmentoj], dormantaj, malfortikaj, nekontinuaĵ [aŭ] plej agresivaj.

### Sanskrita komentario de Vjaso

1. La jogo de la absorbita menso [estas jam] priskribita [en la antaŭa ĉapitro]. Kiel [estas] entreprenita tio : "*ankaŭ la diseliĝanta [t.e. disen eljetiĝanta] menso estu jungata de la jogo !*" ? – Asketado, studado, [sin]dediĉo<sup>1</sup> al la Sinjoro estas agad-jogo.

**De la neasketo la jogo ne plenumiĝas.** "*Ne sen asketado findetruigiĝon atingas la malpuraĵo amasigita pro la impresajoj [lasitaj] de la turmentoj [kaŭzitaj] de senkomencaj karmoj, kaj tuŝita de la [iluzia] multeco de la objektoj*" : la asketado [estas la] kaŭzo [de ĝia detruigiĝo]. Kaj oni opinias : "*tio, ne kontraŭante al la purigo de la menso, [estas] praktikenda de li [la jogano]*".

**Studado**<sup>2</sup> estas ripetado de purigaj mantroj tiaj kiaj *om* ktp., aŭ studado<sup>3</sup> de (pre)skriboj por la liberiĝo. [Sin]dediĉo al la Sinjoro estas ofero de ĉiuj agadoj al la Plej Supera Guruo, aŭ la kompleta reĵeto (aŭ rezigno : *sannjāsa*) de ties fruktoj.

2. Fakte tio [estas] la agad-jogo : [ĝi] havas kiel celon la estigon de la absorbiĝo kaj la malfortikigon de la turmentoj. Ĉar tio, praktikata, estigas la absorbiĝon, kaj faras la turmentojn tute malfortikaj. "*Ĝi faros la malfortikegitajn turmentojn ne produktivaj [de novaj karmoj] kvazaŭ semoj bruligitaj de la fajro de la konsiderado.*"

"*Pro ilia malfortikigo, la subtila konscio ne [estos] denove afliktata de la turmentoj ; perceptante nur la diferencon esteco / [persona] Dio, plenuminte [sian] rolon, ĝi estos taŭgigita por la "retroado al la praorigina" [stato].*"

3. – Nun, kiuj [estas] la turmentoj, aŭ kiaj ?

– La turmentoj estas nescio, mi-konscio<sup>4</sup>, deziro, malamo kaj alkroĉiĝo<sup>5</sup>. "*La turmentoj [estas] la kvin eraroj*". Viglante ili firmigas la rolon de la [tri] ecoj [la unuan dividon de la unueco de la eterna Realto, en (luma) ekvilibro, pasio kaj tenebro], daŭrigaĉas la ŝanĝiĝon, pliintensigas la fluon de

la efikoj kaj kaŭzoj kaj, estante la ŝnuro kiu ligas tiujn ĉi unu post la alia, elvenigas la maturiĝon de la karmo(j).

4. Ĉi tie la nescio [estas la] kampo, la naskiĝtereno de la sekvaj : egoismo ktp., kiuj havas kvaroblajn eblajn formojn : dormantaj, malfortikaj, nekontinuaĵ, plej agresivaj.

– Tiukaze, kio [estas la] **dormanteco** ?

– Por [la turmentoj] kiuj staras kiel nuraj eblecoj en la menso, [la dormanteco estas :] havi la staton de semo. Ĉe ties vekigiĝo [de la semo] ĉe la konekto [de la turmentoj kun la kaŭzo kiu vekas ilin, ili] fariĝas tuj komencontaj [efiki]. [Sed] por la distingivulego kies turment-semoj estas bruligitaj, ne [plu] estas denove tiu [sem-vekiĝo], eĉ kiam fariĝis komenconta [efiki] la konekto [kun la vekiga kaŭzo] :

"*De bruligita semo, kiel [eblus la] ĝermado ?*"

Pro tio oni diras : "*Kiu havas [siajn] turmentojn detruitaj kaj estas sperta [pri jogo], tiu estas en [sia] lasta korpo*"<sup>6</sup>.

"*Nur tiukaze tiu dormanteco, fariĝinte bruligita semo, estas la kvina grado de la turmentoj<sup>7</sup>, ne en la aliaj kazoj*". "*De la ekzistantaj turmentoj, tiam la potencialeco de la semo estas bruligita.*" "*Eĉ kiam objekto fariĝas komenconta [efiki], ne okazas ilia vekigiĝo.*" [Tiel] estas priskribita la [ĝenerala] dormanteco, kaj [tiu] de la bruligitaj semoj kaj [ilia] neĝermado.

La **malfortikeco** estas priskribata : la turmentoj subpremitaj de la estigo de [iliaj] kontraŭaĵo(j) fariĝas malfortikaj. ( . . . )

Precize ĉiuj tiuj turmentoj estas modaloj de la nescio. Pro kio ? Ĉiuj estas saturitaj precize de la nescio. Kiu ajn objekto kre(ig)ita de la nescio, en tiu mem la turmentoj enestas [?] ; ili estas perceptataj en la tempo de la spertado de [konfuzigaj] eraroj, kaj ili malaperas kiam malaperas la nescio.

अनित्याशुचिदुःखानात्मसु नित्यशुचिसुखात्मख्यातिरविद्या ।

दृग्दर्शनशक्त्योरेकात्मतेवास्मिता ।

सुखानुशयी रागः ।

a-nityâśuci-duḥkhânâtmāsu nitya-śuci-sukhâtma-khyâtir a-vidyâ // 5 //

dṛg-darśana-śaktyor ekâtmâtêvâsmitâ // 6 //

sukhânuśayī rāgaḥ // 7 //

अनित्ये कार्ये\_ नित्यख्यातिस्तद्यथा—ध्रुवा पृथिवी, ध्रुवा सचन्द्रतारका द्यौः, अमृता दिवोकस इति ।

तथाशुचौ परमबीभत्से काये शुचिख्यातिः । उक्तं च—

‘स्थानाद् बीजादुपष्टम्भा<sup>०</sup>त्रिःस्यन्दान्निघनादपि । कायमाधेयशौचत्वात्पण्डिता ह्यशुचि विदुः’ ॥ इति । अशुचौ शुचिख्यातिर्दृश्यते—नवेव शशाङ्कलेखा कमनीयेयं कन्या मध्वमृतावयवनिमित्तेव चन्द्रं भित्वा निःसृतेव ज्ञायते । नीलोत्पलपत्रायताक्षी हावगर्भाभ्यां लोचनाभ्यां जीवलोकमाश्वासयन्तीवेति, कस्य केनाभिसंबन्धः । भवति चेत्यमशुचौ शुचिविपर्यासप्रत्यय इति । एतेनापुण्ये पुण्यप्रत्ययस्तथैवानर्थे चार्थप्रत्ययो व्याख्यातः ।

तद्यथा दुःखे सुखख्यातिं वक्ष्यति—“परिणाम-तापसंस्कारदुःखं गुणवृत्तिविरोधाच्च दुःखमेव सर्वं विवेकिनः” इति । तत्र सुखख्यातिरविद्या ।

तथानात्मन्यात्मख्यातिर्बाह्योपकरणेषु चेतनाचेतनेषु भोगाधिष्ठाने वा शरीरे पुरुषोपकरणे वा मनस्यनात्मन्यात्मख्यातिरिति । तथैतदत्रोक्तम्—“व्यक्तमव्यक्तं वा सत्त्वमात्मत्वेनाभिप्रतीत्य तस्य सम्पदमनुनन्दत्यात्मसम्पदं मन्वानस्तस्य व्यापदमनु-शोचत्यात्मव्यापदं मन्वानः, स सर्वोऽप्रतिबुद्धः” । इति ।

एषा चतुष्पदा भवत्यविद्या मूलमस्य क्लेशसन्तानस्य कर्माशयस्य च सविपाकस्येति । तस्याश्चामित्रागोष्पदद्वस्तु सतत्त्वं विज्ञेयम् । यथा नामित्रो मित्राभावो न मित्रमात्रं किन्तु तद्विरुद्धः सपत्नः । यथा चागोष्पदो न गोष्पदाभावो न गोष्पदमात्रं किन्तु देश एव ताम्यामन्यद्वस्त्वन्तरम् । एवमविद्या न प्रमाणं न प्रमाणाभावः । किन्तु विद्याविपरीतं ज्ञानान्तरमविद्येति ॥ ५ ॥

पुरुषो दृक्शक्तिर्बुद्धिर्दर्शनशक्तिरित्येतयोरेकस्वरूपापत्तिरिवास्मिता क्लेश उच्यते ।

भोक्तृभोग्यशक्त्योरत्यन्तविभक्तयोरत्यन्तासंकीर्णयोरविभागप्राप्ताविव सत्यां भोगः कल्पते । स्वरूपप्रतिलम्भे तु तयोः कैवल्यमेव भवति कुतो भोग इति । तथा चोक्तम्—“बुद्धितः परं पुरुषमाकारशीलविद्यादिभिर्विभक्तमपश्यन्कुर्यात्तत्रात्मबुद्धिं मोहेन” इति ॥ ६ ॥

सुखाभिज्ञस्य सुखानुस्मृतिपूर्वः सुखे तत्साधने वा यो गद्दस्तृष्णालोभः स राग इति ॥ ७ ॥

a-nitye kârthe nitya-khyâtis tad yathâ – dhruvâ pṛthivī dhruvâ sa-candra-târakâ dyauḥ a-mṛtâ divaukasa iti /

tathâśucau parama-bībhatse kāye śuci-khyātiḥ / uktaṃ ca –

"sthānād bījād upaṣṭambhān niḥ-syandān ni-dhanād api / kāyam ādheya-śauca-tvāt paṇḍitā hy a-śuciṃ viduḥ" // iti /

a-śucau śuci-khyâtir dṛśyate – navêva śaśâṅka-lekhâ kama-nīyeyaṃ kanyâ madhv-amṛtāvayavanirmîtêva candraṃ bhivvâ niḥ-sṛtêva jñāyate / nīlôtpala-patrâyatâksī hâva-garbhâbhyâm locanâ-bhyâm jīva-lokam âśvâsayantīvêti, kasya kenâbhisambandhaḥ / bha-vati cêyam aśucau śuci-viparyâsa-pratyaya iti / etenâpunye punya-pratyayas tathâivânarthe cârtha-pratyayo vyākhyâtaḥ /

tad yathâ duḥkhe sukha-khyâtiṃ vakṣyati – "pariṇâma-tâpa-samskāra-duḥkair guṇa-vṛtti-virodhâc ca duḥkham eva sarvaṃ vivekinaḥ" iti / tatra sukha-khyâtir a-vidyâ /

tathânâtmany âtma-khyâtir bahyôpakaraṇeṣu cetanâcetaneṣu bhogâdhiṣṭhâne vâ śarīre puruṣôpakaraṇe vâ manasy anâtmany âtma-khyâtir iti / tathaitad atrôktam – "vyaktam a-vyaktam vâ sat-tvam âtmatvenâbhipratītya tasya sampadam anunandaty âta-sampadam manv-âsas tasya vy-âpadam anuśocaty âtma-vy-âpa-dam manv-ânaḥ, sa sarvo 'prati-buddhaḥ" / iti /

eṣâ catus-padâ bhavaty a-vidyâ mūlam asya kleśa-santānasya karma-śayasya ca sa-vipākasyêti / tasyâś cāmītrâgoṣ-pada-vad vastu sa-tattvaṃ vijñeyam / yathâ nâmitro mitrâbhâvo na mitra-mâtraṃ kiṃtu tad-viruddhaḥ sapatnaḥ / yathâ câgoṣ-pado na goṣ-padâbhâvo na goṣ-pada-mâtraṃ kiṃtu deśa eva tâbhyâm anyad vastv antaram / evam a-vidyâ na pramāṇam na pramāṇâbhâvaḥ / kiṃtu vidyâviparītaṃ jñânântaram a-vidyêti // 5 //

puruṣo dṛk-śaktir buddhir darśana-śaktir ity etayor eka-svarū-pâpattir ivâsmitâ kleśa ucyate /

bhoktṛ-bhogya-śaktyor aty-anta-vibhaktyor aty-antâsamkīrṇa-yor a-vibhāga-prâptav iva satyâṃ bhogaḥ kalpate / sva-rūpa-prati-lambhe tu tayoḥ kaivalyam eva bhavati kuto bhoga iti / tathâ cōktam –

"buddhitaḥ paraṃ puruṣam âkāra-śīla-vidyâdibhir vibhaktam a-paśyan kuryât tatrâtma-buddhiṃ mohena" iti // 6 //

sukhâbhijñasya sukhânusmṛti-pūrvaḥ sukhe tat-sâdhane va yo garddhas trṣṇâ lobhaḥ sa rāga iti // 7 //



( *Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj* )

5. La nescio okzigas la miskredon ke la nekonstanto, la malpuro, malbono, ne-Esto estas ka konstanto, la puro, la bono, la Esto.
6. La egoismo rezultas de samidentigo inter la spektanto kaj la spektaklo.
7. La deziro defluas de memoro pri la plezuro.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

5. La nescio estas la [erara] percepto de la eterna, la pura, la plezuro kaj la Mem en la neeterna, la malpura, la sufero kaj la ne-Mem.
6. La mi-konscio estas la kvazaŭa unueco (de memo) de la du [el] kiuj [unu] havas la povon esti vidanto kaj [la alia] la povon esti vidilo.
7. La deziro [estas] post[efiko] de plezuro, [jam] kuŝanta [en tiu ĉi].

### Sanskrita komentario de Vjaso

5. En neeterna objekto percepti eternan, tio jene [= ekzemple] : "Por ĉiam firma [estas la] tero, por ĉiam firma la ĉielo kun luno kaj steloj, nemortemaj la ĉieluloj." Same, en malpura, plej naŭza korpo, percepti puran. Kaj tamen oni diras :

*" Pro ĝiaj deveno kaj semo kaj nutro,  
pro ĝiaj elfluoj kaj ellasitaĵoj<sup>8</sup>,  
pro tio ke oni ĝin devas purigi,*

*saĝulo ja scias : korp' estas malpura."*

La percepto de la pura en la malpura vidiĝas : "Ĉi tiu junulino estas aminda kiel nova lunarko, ŝi havas membrojn kvazaŭ faritajn el mielo kaj nektaro, ŝi povus esti rigardata kiel farita el [eroj de] la luno [kiu estus] rompiĝinta ; ŝiaj okuloj fariĝis blulotusaj petaloj ; per siaj koketaj lumaj mamoj ŝi kvazaŭ revivigas la mondon."

Kion oni rilatigas kun kio ? "Kaj ŝi fariĝas [okazo de] spertado de la konfuziga eraro de [percepto de] la pura en la malpura." Per tio la spertado de la bona en la malbona, same kiel la spertado de la sencohava en la sensenca, estas [fin]traktita.

La percepton de la plezuro en la sufero priskribos la jeno [en II,15] : "Per la suferoj [devenantaj] de la ŝanĝiĝo, de la doloroj kaj de la internaj emoj, kaj pro la konflikto inter la influoj de la [tri] ecoj [ekvilibro, (agema) pasio, (pasivema) tenebro], nur sufero [estas] ĉio, por la distingivulo". En tio la percepto de plezuro [estas] nescio.

Simile, la percepto de la Mem en la ne-Mem estas "la percepto de la Mem en eksteraj iloj, konsciaj aŭ nekonsciaj, aŭ en la korpo, ejo de la ĝuoj [manĝi, seksumi ktp.], aŭ en la menso, ilo de Dio [puruŝa] : en la ne-Mem".

Simile estas dirita pri tio la jeno : "Komplete konvinkita ke kio estas manifestiĝinta aŭ nemanifestiĝinta estas per esenco la Realo, li, homvizaĝulo, priĝojas ties prosperon estiel la prosperon de

si mem kaj pribedaŭras ties disfalon estiel disfalon de si mem, la homvizaĝulo : li tuta estas neplenvekita<sup>9</sup>".

Tiu ĉi kvarpieda<sup>10</sup> nescio estas la radiko de tiu ĉi sinsekvo de turmentoj kaj de la dormanta karmo kun ĝia maturiĝo. Kaj ĝia substanco, kiel tiu de "neamiko" aŭ "nebovinspuro", [estas] rigardenda estiel havanta realecon. Ekzemple "neamiko" [signifas] nek neeston de amiko nek nur amikon sed ties malon : rivalo. Kaj ekzemple "nebovinspuro" [signifas] nek neeston de bovinspuro nek nur bovinspuron sed alian substancon diferencon de ambaŭ ["neesto de bovinspuro" kaj "bovinspuro"] precize pri tiu ĉi punkto.

Tiel "nescio" [estas] nek ĝusta kono nek neesto de ĝusta kono, sed [estas] io diferenca de la kono, mala de la scio<sup>11</sup>."

6. Dio havas la povon esti vidanto, la intelekto havas la povon esti vidilo ; la kvazaŭa enfalo en staton de unueco de tiuj du, [tiu] turmento nomiĝas mi-konscio<sup>12</sup>.

Kiam kvazaŭ okazas la neapartigo de la povo esti spertanto kaj la povo esti spertaĵo [kiuj fakte estas] senĉese apartaj, senĉese nemiksitaĵ, [tiam] la spertado rigardas [tiun neapartecon] vera. Sed ĉe la reakiro de la propra naturo "estas nur izoliteco de [ĉiu el ] ambaŭ [spertanto kaj spertaĵo] ; [tiam do] de kie [povus veni] la spertado ?"

Kaj tiel estas dirite :

*" Mense ne vidante ke aparta estas  
la spirito plej supera, laŭ l'aspekto,  
la naturo kaj la scio, oni havus  
falsan bildon pri la Mem, pro iluzio."*

7. Ĉe kiu konis plezuron, tio kio, akompanata de la memoro de la plezuro, estas sopirego, soifego, avido por la plezuro aŭ ties efikilo, jen kio estas deziro.

दुःखानुशयी द्वेषः ।

स्वरसवाही विदुषोऽपि समारूढोऽभिनिवेशः ।

ते प्रतिप्रसवहेयाः सूक्ष्माः ।

ध्यानहेयास्तद्वृत्तयः ।

दुःखाभिज्ञस्य दुःखानुस्मृतिपूर्वो  
दुःखे तत्साधने वा यः प्रतिघो मनुजिघांसा क्रोधः स  
द्वेषः ॥ ८ ॥

सर्वस्य प्राणिन इयमात्माशीनित्या भवति सा न  
भूवं भूयासमिति । न चाननुभूतमरणघर्मकस्यैवा  
भवत्यात्माशाः । एतया च पूर्वजन्मानुभवः प्रतीयते  
स चायमभिनिवेशः क्लेशः ।

स्वरसवाही कृमेरपि जातमात्रस्य प्रत्यक्षानु-  
मानागमैरसंभावितो मरणत्रास उच्छेददृष्ट्यात्मकः  
पूर्वजन्मानुभूतं मरणदुःखमनुमापयति ।

यथा चायमत्यन्तभूषु दृश्यते क्लेशस्तथा विदुषो-  
ऽपि विज्ञातपूर्वापरान्तस्य रूढः । कस्मात्? समाना  
हि तयोः कुशलाकुशलयोर्मरणदुःखानुभवावियं वासना  
॥ ९ ॥

ते प्रतिप्रसवहेयाः सूक्ष्माः । ते पञ्च क्लेशा  
वर्षबीजकल्पा योगिनश्चरिताधिकारे चेतसि प्रलीने  
सह तेनैवास्तं गच्छन्ति ॥ १० ॥

स्थितानां तु बीजभावोपगतानाम्—ध्यानहेयास्तद्वृ-  
त्तयः । क्लेशानां या वृत्तयः स्थूलास्ताः क्रियायोगेन  
तनूकृताः सत्यः प्रसंस्थानेन ध्यानेन हातव्या याव-  
त्सूक्ष्मीकृता यावद्दृग्बीजकल्पा इति । यथा च  
वस्त्राणां स्थूलो मलः पूर्वं निर्धूयते पश्चात्सूक्ष्मो  
यत्नेनोपायेन वा श्रपनीयते, तथा स्वल्पप्रतिपक्षाः  
स्थूला वृत्तयः क्लेशानां सूक्ष्मास्तु महाप्रतिपक्षा इति  
॥ ११ ॥

1/ *Nidhāna* signifas jen deponadon, jen deponejon, jen deponaĵon ; kaj de tiu ĉi senco venas la signifo : rezervo, trezoro. Kaj *pra* signifas antaŭe aŭ antaŭen. Laŭ tiu etimologio, *Īśvara-pranidhāna* povas signifi la fakton deponi [siajn zorgojn] antaŭen [ĉe la piedoj] de la Sinjoro ; aŭ [havi nur] la Sinjoron kiel trezoron antaŭ [si]. Oni memoru la parolon de Jesuo : "Kie estas via trezoro, tie ankaŭ estos via koro" (Mt 6,21, Lk 12,34) ; kaj : "Nenia servanto povas servi al du sinjoroj (...) vi ne povas servi al Dio kaj al (Ma)mono !" (Lk 16,13, kaj simile en Mt 6,24). Bonvolu do korekti la sutron I-23 kaj ties komentaron (en n-ro 17, p. 21), anstataŭigante *kontomplado (de)* per [sin]dediĉo (al), kaj *meditado (abhi-dhjāna)* per *aspiro* (laŭetimologie "almeditado"), kaj *de ties meditado* per *pro ties aspiro*.

2/ Laŭvorte : (mallaŭta) "legado por si mem".

3/ Alia sanskrita vorto, kiu signifas : "Legado, recitado, memorado, parkerigo".

4/ *Asmi-tā* : la fakto (diri aŭ) pensi *asmi* ("mi estas").

5/ Laŭ posta komento de Vyāsa [vidu II,9 ĉi-malsupre] oni devus subkompreni : al la vivo. Laŭetimologie la vorto signifas "sininstalemo" : ia nemoviĝemo, mensostato bone ilustrita, ekzemple, de Petro dum la transfiguriĝo de Jesuo : "*Rabeno, estas bone por ni esti ĉi tie ; kaj ni faru laŭbojn...*" (Mk 9,5).

6/ Tio estas : li ne plu reenkarigiĝos.

7/ Noto de Bengali Baba tutsimple klarigas ke "la 5-a stato de turmentoj [estas] ilia kompleta detruo". Ŝajnas iom artefarite, paroli pri "dormanteco" en tiu ĉi kazo.

8/ Plej verŝajne : respektive utero, spermo, digesta-

duḥkhānuśayī dveṣaḥ // 8 //

sva-rasa-vāhī viduṣo 'pi sam-ārūḍho<sup>13</sup>  
'bhiniveśaḥ // 9 //

te prati-pra-sava-heyāḥ sūkṣmāḥ // 10 //

dhyāna-heyās tad-vṛttayah // 11 //

duḥkhābhijñasya duḥkhānusmṛti-pūrvo duḥkhe tat-sādhane vā  
yaḥ pratigho manyur jighāmsā krodhaḥ sa dveṣaḥ // 8 //

sarvasya prāṇina iyam ātmāśīr nityā bhavati mā na bhūvaṃ  
bhūyāsam iti / na cānanubhūta-maraṇa-dharmakasyaiśā bhavaty  
ātmāśīḥ / etayā ca pūrva-janmānubhavaḥ pratīyate sa cāyam abhi-  
niveśaḥ kleśaḥ /

sva-rasa-vāhī kṛmer api jāta-mātrasya pratyakṣānumānāgamair  
asambhāvito maraṇa-trāsa uccheda-dṛṣṭy-ātmakaḥ pūrva-janmānu-  
bhūtaṃ maraṇa-duḥkham anumāpayati /

yathā cāyam aty-anta-mūḍheṣu dṛśyate kleśas tathā viduṣo 'pi  
vijñāt-pūrvāparāntasya rūḍhaḥ / kasmāt ? samānā hi tayoh kuśalāku-  
śalayor maraṇa-duḥkhānubhavād iyam vāsanā // 9 //

te pañca kleśā dagdha-bīja-kalpā yoginaś caritādhikāre cetasi  
pralīne saha tenaivāstaṃ gacchanti // 10 //

sthitānām tu bīja-bhāvōpagatānām – dhyāna-heyās tad-vṛttayah /  
kleśānām yā vṛttayah sthūlās tāḥ kriyā-yogena tanū-kṛtāḥ satyah pra-  
samkhyānena dhyānena hātavyā yāvat sūkṣmī-kṛtā yāvad dagdha-  
bīja-kalpā iti / yathā ca vastrāṇām sthūlo malaḥ pūrvaṃ nirdhūyate  
paścāt sūkṣmo yatnenōpayena vā apanīyate tathā svalpa-pratipakṣāḥ  
sthūlā vṛttayah kleśānām sūkṣmās tu mahā-pratipakṣā iti // 11 //

taĵoj, urino kaj fekaĵo.

9/ La aŭtoro verŝajne konscie elektis ambiguan vorton, signifantan aŭ "kiu ne atingis la plejsuperan konon", aŭ "stulta, stultulo". La enesto de la dua senco en la vorto estas substrekita per la malofta kaj amuza kunmetaĵo *manv-āna-* (se mi ne eraras "hom-vizaĝul-") : iu "kiu havas [nur !] la vizaĝon homa" (subkomprenite : sed ne homan cerbon malantaŭ ĝi), kaj do nur la aspekton sed ne la veran proprajon de la homo, la inteligenton...

10/ La kvar eraraj perceptoj.

11/ Fakte oni do devus nomi ĝin en esperanto "mal-scio", vorto cetere jam uzita de Zamenhof. Ĝis nun mi ne uzis ĝin nur por konservi la laŭvortan formon de *avidjā* (vidu : "a/" en PIV p. 1). Sed la precizigita senco estas pli grava, do mi denun uzos "mal-scio".

12/ Vidu sur la sekva paĝo.

13/ Bangali Baba k Sw. Sadānanda prezentas la varianton *tathārūcho*, de *tathā* : "tiel". Sed tio ne ŝanĝas la senco *ĉar sam-ā-RŪH-* kaj *ā-RŪH-* estas preskaŭ sinonimaj.

14/ La tri validaj fontoj de kono (vidu I,7 en 16, p. 7).

15/ *Vāsanā* : unuasence (konkrete) subtilaodoro postlasita de parfumo, ekzemple en vestaĵo aŭ ejo ; sekve, subkonscia restaĵo de impresoj.

16/ *Anu-bhava*, etimologie : estiĝo (*bhava*) [de sento] sekve de (*anu*), t.e. okaze de [travivaĵo, sen konscia memoro pri tiu ĉi].

17/ Ankoraŭ nun en Bharato estas pilgrimuloj kiuj lavas siajn vestaĵojn sen sapo, sinsekve trempante ilin en rivero kaj igante ilin bati kontraŭ ŝtonegon de la bordo, kio estas sufiĉe peniga en la tiea varmo.

( *Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj* )

8. La malakcepto devenas de la timo suferi.
9. La instinkto de antaŭsingardemo, ligita al la sento pri sia persona graveco, enradikiĝas en ni, eĉ en la erudiciulo.
10. Kiam tiuj suferigaj kaŭzoj estas malfortaj, oni povas elimini ilin per inversiga fluo.
11. La mensaj malordigoj kaŭzitaj estas forigeblaj per meditado.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

8. La malamo [estas] post[efiko] de sufero, [jam] kuŝanta [en tiu ĉi].
9. La alkroĉiĝemo [al la vivo ?], havanta sian propran guston, leviĝas eĉ el [la koro de] la scianto. [Subkomprenite, tial oni ne bezonas priskribi ĝin ĉar ĉiu ĝin spertas.]
10. [Faritaj] subtilaj, tiuj estas forigendaj per la retroado al la praorigina [stato].
11. Iliaj turniĝoj [estas] forigendaj per la meditado.

### Sanskrita komentario de Vjaso

8. Ĉe kiu konis suferon, tio kio, akompanata de la memoro pri la sufero, estas batalemo, kolero, batemo, furiozo kontraŭ la sufero aŭ ties efikilo, jen kio estas malamo.


9. De ĉiu spirulo [= vivanto], eterna estas jena deziresprimo por si mem : "Mi ne malekzistu, mi estu plu !" Kaj tia deziresprimo por si mem ne estas [la preĝo] de iu kiu ne havus la esencan kvaliton esti spertinta [mem] la morton. Kaj per tiu [deziresprimo] la im-presio de antaŭa(j) ekzisto(j) estas rekonita ; kaj tio estas tiu ĉi turmento : la alkroĉiĝemo [al la vivo].

La promorta teruro de eĉ ĵus naskita insekto havas sian propran guston [aŭ : kunportas la instinkton pri memkonservo ?], kaj estas konjektita nek pere de percepto, nek de indukto, nek de la tradiciaj scioj<sup>14</sup> ; ĝi havas la naturon de la ideo pri [propra] detruo kaj ĝi pravas [ke] la sufero de la morto(j) [estis] spertita dum antaŭa(j) ekzisto(j). Kaj kiel tiu ĉi turmento observiĝas ĉe la senlimaj idiotoj, tiel same ĝi leviĝas eĉ el [la koro de] la scianto kiu tute konas la limon de kio estas antaŭ kaj post [la vivo ?]. Pro kio ? Ĉar sama estas tiu ĉi impresajo<sup>15</sup> de tiuj du, la sperta kaj la nesperta, pro la impresajo<sup>16</sup> de sufero de la morto.

10. Tiuj kvin turmentoj preskaŭ similaj al bruligitaj semoj en la solviĝanta menso – kiu plenumis sian rolon – de la jogano, malaperas kun ĝi.

11. Nun, de tiuj [turmentoj] restantaj en stato de semoj, la *turniĝoj estas forigendaj per la meditado*. De la turmentoj, "*tiuj turniĝoj kiuj [estas] grandaj, post malfortikigo per la ago-jogo [estas] detruendaj per la konsiderado, per la meditado, dum [ili estas] faritaj subtilaj, dum [ili estas] kvazaŭ bruligitaj semoj*". Kaj kiel unue la malsubtila malpureco de la vestaĵoj estas forskuita [kaj] poste la

subtila estas forigata per peno<sup>17</sup> aŭ per [iu] procedo, tiel "*la malsubtilaj turniĝoj de la turmentoj [estas] malgrandegaj kontraŭaĵoj sed la subtilaj [estas] la grandaj kontraŭaĵoj*".



## El Bahaa raporto pri la lasta UK

Temas pri manuskripta kopio de malneta 8-paĝa raporto al la [bahaa] "Aŭstralia Nacia Spirita Asembleo" kaj BEL (Bahaa Esperanto-Ligo), verkita "tuj post la unua U.K. en la Antipodoj...", kaj afable sendita de la aŭtoro. Mi do ĉerpis nur kio interesas la (jam esperantistajn) legantojn, kaj espereble ne nur la bahaanojn. (*La Redaktoro*)

### Antaŭ la UK

Eble estas la vero ke malmultaj Bahaanoj lernas (...) Esperanton, sed per siaj lastatempaj agadoj en Adelajdo ili pruvis subtenon al la universala helplingva principo (...)

Fortigita per subtenletero de la amata Nacia Spirita Asembleo de Aŭstralio, letero ekvivalenta plenrajtigita peton al la loka Bahaanaro ke ili donu prioritaton al la Esperanto-Kongreso, la vojaĝemulo Paul Desailly povis galvanizi la Bahaan fronton. Lia tasko instrui Esperanton al kvardek kvin studantoj en kvin apartaj grupoj simpliĝis dank'al malavara loĝistika subteno proponita de kelkaj Adelajdaj Bahaanoj kiuj eĉ insistis pagi por siaj lecionoj. Ina grandanimulo turnis sian modernan komercejon, meze de la urbo, en lernejon dufoje semajne, monaton post monato (...)

### La Multkreda Diservo

Proksimume tricent homoj ĉeestis la plenplenan Diservejon de la *Scots Uniting Church*. (...) **Unuafoje** tiel diversaj grupoj kiel Bahaanoj, Framasonoj, Kristanoj, Kriŝno-konscianoj, Oomotanoj ktp. **publike unuiĝis preĝe dum la oficiala religia servo** kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Elvokema gitarludo kaj kantado de nia Kuba samideano Juliano Hernandez sekvis 15 minutojn da **pormeditada silento** ĉe la fino de la Diservo.

Poste oni interese rimarkis malsimilajn sintenojn pri la silento. Unu okcidentano milde surpriziĝis, eĉ ete malstreĉiĝis; tamen orientanoj estimis tiujn momentojn da trankvileco. La sagaco de retrorigardo sugestas kuniĝon de ambaŭ opinioj venontfoje, per mallaŭta fonmuziko.

### Helpo de la Bahaanoj

Taĉmento de junaj Bahaaj Esperantistoj senmakule plenumis siajn devojn kiel enkondukistoj kaj gvidistoj dum la tuta Kongresa semajno (...) Ili rekompence ricevis ĝisdatigitan informon pri la Bahaa Monda Centro, de BELano ĵus alveninta de la "Universala Domo de Justeco" [en Israelo].

El Nepalaj kaj alilandaj buŝoj de BEL-anoj, nin allogis aŭskulti tutmondan kreskadon de la [bahaa] Kredo, sen neceso de interpretisto (...)

Bahaanoj de ŝildopentrista firmao ("motoroj" de *Ridvan*, la revuo de la 1.400 Bahaanoj en tiu ĉi ŝtato de la insul-kontinento) ofertis liveri tridek **Esperanto-standardojn**, kiuj **gracie flirtis** en la urbocentro (...) (Pro senbrida kosto la LKK nuligis la standardo-mendon ĝis kiam Bahaaj Esperantistoj per siaj propraj manoj savis la situacion.)

Aldone, ili aperigis en *Ridvan* reklamilon kiu varbis la helpon de malavaraj Bahaanoj kiuj proponis ne nur donaci senpagajn tranoktejojn por multaj senhavaj Esperantistoj, sed ankaŭ nutri ili.

### La Bahaa aranĝo

La Adelajda Bahaanaro rajtas pretendi la plej sukcesan aranĝon de la Bahaa Kredo en Esperantujo – kiu estis samtempe formala kaj digna – ekde la tagoj de Martha Root kaj Lidja Zamenhof en la jaroj inter la du mondmilitoj. La prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, la juĝisto Keppel Enderby, iama nacia prokuroro (...), tiel admiras la etikan pozicion de la Bahaanoj, ke li estis ravita malfermi Bahaan akcepton honore al la unua UK en Aŭstralio (...)

Loka Bahaa psikiatro ricevis la honoron alparoli 200 homojn, ĉefe ne-Bahaanojn, pri la principoj de la Bahaa Kredo. Li erudicie esploris la demandon de universala helpa lingvo. (Liaj vortoj estis esperantigataj de Trevor Steele...)

Poste, dum la sama akcepto, filmpremiero reliefigis erojn el la **vivo de Zamenhof**. Bahaa Esperantisto kaj entreprenisto el Melburno (...) pagis kaj enscenigis la **filmeton**. Viktoriano lerte kaj brile aktoris en la rolo de la Esperanto-majstro.

Kiam efemere aperis signoj de la lingva barilo kiuj eble kondukintus al malunueco, la internaciaj lingvoj de muziko kaj danco komplementigis la akcepton dank'al profesiaj Bahaaj muzikistoj (...)

Je persona nivelo ege kortuŝis min ke niaj Japanaj kaj Sud-Amerikaj geamikoj – mi aparte aludas al niaj religiaj geamikoj de Oomoto kaj Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz – aprezis la Bahaan iniciaton. **Paul Desailly, 3-8-1997**

En **Montpeliero** la ekumena diservo okazos la dimanĉon 2-8-1998 je la 17-a. Kaj ankaŭ estas planitaj **Komuna silentado**, kaj la tradicia **IRKE** (Inter-Religia Kunveno Esperantista).

## Leteroj

Estimataj respond[ec]uloj de ASISTI,

Mi prezentas al vi projekton pri ĝenerala komparoj inter ĉiaj lingvoj el la mondo. Ni petas al vi ajnajn gravajn **tekstojn religiajn** kaj spiritajn, en iliaj originalaj lingvoj kaj kun ties tradukoj al Esperanto. Cetere mi persone estas **fakulo pri interteologio kaj esotera penso**; nun mi tradukas la *Milinda-pañha* [la *Demandoj de Mevandro*, la greka reĝo Menandro] el la palia al la hispana. (A.X. Casanova Domingo, Calle de las Peñuelas, N. 18, piso cuarto C., ES-28005 Madrid, Faks. 341-5173027.)

S-ro Prez. kaj kara samideala frato Ch. Lavarenne,

La "*Destino*" volis ke ni interrilatiĝu ĉar (...) mi ankaŭ ricevis de mia kara kaj granda esperantista amiko Germain Pirlot la [francilingvan] suplementon de tiu sama n-ro 20. Tial, escepte, mi forlasas ĉion alian por tuj ekestigi rilaton kun la "nekonatuloj" kiujn vi estis por mi ĝis hodiaŭ!

Ĉi-kune mi sendas al vi, nur por informo, nian fundamentan verketon (*Précis de l'Alliance Universelle*) kaj kelkajn numerojn de nia gazeto (*L'Unité humaine*), en kiuj vi "nature" trovos sufiĉe multajn "neakcepteblaĵojn" sed tamen, mi esperas, la similecon de la komuna idealo: la fratiĝo inter la homoj, idealo kiu, nur per si mem, motivigas rilaton kun vi, kio montriĝos fruktodona eĉ se niaj vojoj restas paralelaj. Almenaŭ, miaflanke, mi faros mian tutan eblon por tio, ĉar mi havas la benon **ĉion kompreni kaj ĉion toleri...**

Mi ĵus ricevis ankaŭ la benon kiun mi deziris de pluraj jardekoj: la **tradukiĝo de la "Précis" en Esperanton**; kaj mi esperas ke la sama beno fariĝos kompleta trovigante al mi **presiston** kompetentan kaj ne tro monavidan...

Persone mi estis, dum pluraj jaroj (...) aprobanto kaj faranto de religia ekumenismo. Sed la travivita sperto kondukis min al la **nereligieco**, kiun mi rekomendas de jam duonjarcento ...kaj kiu koncernas nur la organizitajn religiojn (mi iam estis [katolika] seminariisto) kaj ne la tutan Spiritualecon ĉar ia "Vivata Spiritualeco" konsistigas la unuan pilieron de la Estontaj Tempo. (Dua piliero estas la Mondismo, kies parto Esperanto estas, kaj la tria estas la Abundo-disdona ekonomio.)

Ĉar, bedaŭrindege, estas evidente kaj neneadeble ke la organizitaj religioj ĉiam disigis la homojn en rivalajn klanojn kaj daŭrigas, eĉ nuntempe, divide kontraŭstarigi ilin en fratmortigaj bataloj kun la sensenca hororo fari tion en la nomo de la sama Profeto... Tio ĉi ĉar ĉiu religio kredas esti la **sola posedanto de la Vero** kaj de la savo de la Homaro, **tiel blasfemante, plej ofendege kaj sen scii tion, la Kreinton de la Universo.** (...)

Atendante vian reagon, vian *sinceran* opinion kaj viajn trafajn sugestojn, kara samideala frato, mi sendas al vi miajn varmajn kaj sincerajn gratulojn pro via tiel nepra agado favore al Esperanto, kaj ankaŭ sur la religia kampo ĉar ekumenismo estas natura prepara ŝtupo al Universalismo.



Kun mia tuta morala subteno kaj miaj bondeziroj de sukceso, via frato **Ludovic**, homa fondinto kaj monda kunordiganto de la movado *l'Alliance Universelle*\*

\* Iu "Universala Ligo", sed ne la samnoma esperantista, malfondita.

— La Prez. estas s-ro Yoŝimi Umeda. Mi resp. poste.

Kara Argelio,

1-10-1997

Dankon pro via letero, presita sur p. 27 de *Asistilo* n-ro 20. Mi povas simpatii, ĉar mi devis viziti hospitalon por similaj esploroj. (...)

Pri viaj spertoj kun la viro kiu diris "*Mi estas Johano*", mi preferas opinii ke li estis kristano kun tiu nomo, sed mi komprenas vian deziron danki al Jesuo pro via resaniĝo. Tio estas tute prava.

Pri via neakcepto de ĉio kion vi aŭdas, mi ankaŭ simpatias, sed mi konsilas ke vi trovu la plej bonan grupon da kristanoj, kiu ekzistas proksime al via loĝejo, kaj **petu ilin akcepti vin** kiel membron, **sen ia promeso kredi tion kio ŝajnas al vi esti ne pruvebla el la sanktaj skriboj. Se oni atendus ĝis oni trovus iun perfektan eklezion, oni eble prokrastus tro longe**, kaj se finfine oni aliĝus al ĝi, ĝi ne estus perfekta plu!

Via frato,

**David Featherstone**

### Publika letero al "*pseŭdopatriarko*" Pimen

Filo de fama kaj respektita ortodoksa pastro, B. Leonov estas regiona delegito por la Nacia konsilio de Bulgara Ortodoksa Eklezio. Kiel aktivulo de movado por unuigo de la Eklezio li organizis la proteston kontraŭ la agoj de grupo de episkopoj kiuj, "*inspiritaj de lokaj kaj eksterlandaj politikuloj, kontraŭkanone proklamis la elekton de la pseŭdopatriarko Pimen*".

Li ankaŭ "*alvokis la pseŭdopatriarkon Pimen kaj aliajn politikulojn ĉesi la kontraŭkristanan agadon kaj agi por la unuigo de la Bulgara [ortodoksa] Eklezio gvidata de la lande kaj tutmonde atestimata kanona patriarko Maksim*".

(Laŭ *Espero* n-ro 5 p. 4 : P.K. 44, BG-4300 Karlovo)

N.B. La red. ne respondecas pri esprimitaj opinioj.

# Granda Unueca Kredo

## Enkonduko (fino)

18. Se tiu ĉi libro ne povas helpi al vi kompreni vian kredon, tio estas do tre bedaŭrinda. La ĉefa celo de la libro estas igi religianojn pli profunde kompreni sian kredon. Mi ofte vidas :

**kredanto buŝe al sia dio, sed age kontraŭ li.**

Cetere, ĝi ne estas helpilo de kia ajn kredo ; tiu ĉi estas integra tuto, kaj havas sian teoriant sistemon.

19. Per GUKo, sur la dezerto de kredo, mi fondas pompon [?] ! Mi tiel trovas la veran uteron de vivo, kiu estas varmeta kaj bela.

20. Je la nomo de GUKo : la homaro jam havas tian forton per kia ĝi povus pereigi sin mem. La tero fariĝus venenejo. Ĉe la turnopunkto, kiel GUKistoj, vi devas malhelpi tian proceson ! Tio ja estas mia esenca volo. Ne lasu la miljaran civilizacion droni en katastrofon ! Amen.

21. Mi pie atendas voĉon el GUKo, kiam antaŭ mi kuŝas la longa sang-rivero kaj la vasta tero, kiuj estas kaŭzitaĵoj de la karno de mia prapatro. Mi pentas, mi pentas, mi pentas ! ...en formo de verkado.

22. Karaj geamikoj, ne fariĝu ŝtono konsistigita de instinktoj ! Fariĝu homo libera, je GUKo ! Amen.

23. GUKistoj, vi estas kuracisto de la homa animo : ne serĉu klienton surstrate ! En nia sankta palaco sidas tiu kiu elflugis el la valo de mizero.

24. En okcidento, mi vidas ke la sciencistino estas brulita en fajro ! En oriento, mi vidas ke la bravulo kiu serĉas la sunon mortis pro soifo ! Tiam mi preĝas je GUKo.

25. Ĵetu ovon sur rokon, krevus la ovo !

Vivu kontraŭ GUKo, pereus la vivo !

Antaŭa estas la principo de la fiziko, malantaŭa estas la teorio de Granda Unueca Kredo ; ambaŭ apartenas al signo de GUKo !

26. GUKo estas etero, GUKo estas Tao, GUKo estas apero ! GUKo estas patrino de la fiziko ; per ŝi ni konus ŝian filon ...diversajn aperojn !

27. Ŝpari vorton en verkado estas iu virtaĵo en GUKo ! Amen.

28. Antaŭ la naturo vi ne estas batalema soldato, vi estas malobeema knabo ! En la profunda valo de la kosmo, nur vi povus kompreni la sonoradon de diversaj birdoj. Kun ekscito huras : GUKo !

29. [Vi] Ne scias veron, kaj vivu sen ideo ...[la] malbono [estas] ja antaŭ vi ! Ĉe ili troviĝas GUKo, do inter ili ne troviĝas pereulo !

30. Mia penso haltus je tiam kiam mi elsendos vian vorton ! ...GUKo.

31. Post mia morto, en mian buŝon estos metita la arbido.

Sur la vasta dezerto reviviĝus mia animo !  
Post mia morto, metu miajn okulojn en okulkavon de blindulo.

En la obskuro releviĝus la ama suno !

Post mia morto, bonvolu meti sur vian tablon mian libron.

En la kosmo reverdigu la kadukigan vivon !

Amen.

32. En la mondo mi vidas du specojn de homoj : iu zigzage al la sino de GUKo ; alia rekte al sia ĉerko ! Mi benus la antaŭan kaj pereigus la malantaŭan. GUKo benu nin !

33. Scienco estas ŝlosilo, kiu malfermas pardonon al GUKo. Kiam vi sukcesos en tio : la tenera lingvo venus ! La virta mieno venus ! La brila suno venus ! Amen.

34. Sur maro da libroj, ĉi libro estas flosanta botelo, en kiu troviĝas feliĉo de vivo ! Hura !

35. La vento de la kosmo ankoraŭ muĝas : GUKo... GUKo...

(Daŭrigote ?)

## Jebumo (Ĉinio)

Antalya, 25-11-1997

Kara ASISTI,

(...) La celo de **nia Asocio** estas esplori kaj science klarigi ĉian specon de **psika fenomeno**, kondukante variajn spiritajn eksperimentojn kaj enketojn, por **studi la naturon de la homa ekzistado** kaj por eviti la misinterpreton de la kono tiel akirita, por servi al la antaŭenigo de pli altaj moralaj principoj kaj spiritaj valoroj.

La *Asocio de Spirita Esplorado de Antalya*, por plenumi siajn fundamnetajn celojn :

– organizas naciajn seminariojn, kursojn, prelegojn kaj simpoziojn ;

– kunlaboras, **korespondas** kaj starigas rilatojn **kun individuoj**, institucioj kaj universitatoj sur nacia kaj internacia niveloj.

(...) Se vi volas interŝanĝi pensojn kaj sentojn, bonvolu skribi al ni, mi petas.

Kun ĉiaj bonaj deziresprimoj

**Levent Ünver**

**Adresoj** (por anglalingva korespondado): Ruhsal Araştırmalar Derneği, P.K. 779, Antalya, Turkio.

Frata asocio : Bilyay (Fondajo por diskonigi la konon por unuigi la homaron), P.O. Box 9 Beyoğlu, 80072 Istanbul, Turkio ; Faksilo : +90 212 252 07 18, elektronike : bilyay@ibm.net (kun 2.500-libra biblioteko).

## Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

Jen komenciĝas la oka artikolo de tiu serio. Antaŭ jam kvar jaroj venis la unua, kaj relegante ilin, mi retroobservas la fosadon de la sama sulko, la konstruadon de la sama verko, la esprimon de la sama sperto.

De "pagita anonco" oni atendus ke ĝi esprimu la vidpunkton de la paganta asocio. Ne estas tiel, ĉar mi mem pagis la anoncojn, ne iu ajn komunumo de Aresaj pilgrimantoj, kvankam al ilia mesaĝo mia voĉo donas pli grandan eĥon ol al aliaj. **Pri miaj paĝoj respondecas nur mi**, ne iu ajn komunumo, religio, sekto aŭ movado. Se pri tio la mencio "pagita anonco" sugestus dubon, prefere ĝi malaperu.

Tion reliefigas mia serio ke, **en nia epoko, ne ĉesis profetismo** en la Biblia signifo : kiel ĉe naskiĝo de bahaismo kaj Oomoto, ankaŭ en Fatima, en Arès, en Medjugorje, leviĝis homoj atestantaj ke la Di-patrino aŭ Dio mem enmiksiĝis en ilian vivon por ke ili mem parolu al homoj.

**Bedaŭrinde ne perfekte koheras la asertoj** de tiuj nuntempaj profetoj, **almenaŭ ŝajne** : pri la rolo de la papo, pri la triunueco de Dio, ne ĉiuj same parolas. Tiuj ŝajnaj nekohercoj, ankaŭ observeblaj inter religioj, instigas min al duflanka reago.

Unuflanke, **mi provizore donas mian preferon al** la profeta movado kiu ŝajnas al mi la plej profunda kaj ampleksa, fakte **la Aresa revelacio**, tiel profunde ligita al la Mosea-Jesua-Muhamada fluo profeta.

Aliflanke, **mi rifuzas fariĝi homo el unu profeto**, kaj ne vidas alian manieron solvi la ŝajnajn nekohercojn ol **inviti la profetojn mem kunveni** por humile interŝanĝi siajn respektivajn spertojn.

**Tiucele mi jam invitis** Madeleine el Dozule (Francio), la infanojn el Medjugorje, Vassula, Lucian el Fatima, fratinon Beghe el Bruselo, kaj Michel Potay. Respondis nur la tri lastaj, kaj ne morgaŭ ili kunvenos. **Al tiu iniciato novstila, eble iam iel utilos zamenhofaj lingvo kaj spirito.**

**François Degoul**

(Pagita anonco)

(Interŝanĝaj aŭ pagitaj anoncoj)

Mi serĉas (ne nepre esperantistajn) anojn de la sufi-tradicio de Shah Ne'matollah Vali (Kermani). Laŭdire la centro nun situas en Londono, kie ankaŭ aperas ties revuo *Sufi*.

Adreson aŭ informojn al : Lydia Kerremans, Verberdestede 60, B-2870 Puurs-Liezele.

### La Kosmologio de Martinus

- estas spirita scienco pri eternaj principoj kaj strukturoj de la vivo
- donas grandan perspektivon pri la intelekta kaj humana evoluo de besto al vera homo
- kreos per studado kaj praktikado pacon en la homo
- unuiĝos kun la materia scienco kaj kontribuas al kreado de internacia mondogo - kaj paco

Kosmologi-kursoj en Danio, 9a-22a de aŭgusto 1998

Petu pliajn informojn kaj senkosten numeron de la revuo KOSMOS

**Martinus-Instituto**

Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F. • ☎ : +45 3834 6280 Faks: +45 3834 6180  
Reto: martinus@centrum.dk

**Neniu unuiĝo aŭ membreco**

### La Kancerkliniko

Politika, Kultura,  
Skandalema, Ajnista

"La mondo ŝanceliĝas,  
Nia Kliniko plu staras"

5 n-roj jare, 125 FF / 42 gld

**Direktoro/Redaktoro:**

J. Le Puil, Les Cocherats  
FR - 18210 Thaumiers  
Pôk : Paris 12 729 73 X  
(aŭ UEA-konto klik-g)

## Ni ricevis

Ni danke gratulas la donacintojn kaj provos iom post iom recenzi(gi) kelkajn el ili...

**La Robaioj de Omar Kajjam** [1040-1123] en 9 lingvoj, komp. de Mohammad Poorgholi Belverdi, Iran [Tabriz ?] : M.P.B., 1997, 1-a eld., 132 p., 9,5 \$, ISBN 964-90524-2-9. Mendebila ĉe la aŭtoro : 7, shahid Joudy Anbarsardar, Mofateh, IR-51457 Tabriz, Irano, Tel. +98-41-840484, Faks. +98-41-872615. UEA-konto mopb-k, triona rabato ekde 3 ekz.

La **E-traduko, de G. Waringhien**, estas pli ampleksa (pli ol 200 anstataŭ 150) ol en la dua (1994), senŝanĝa eld. (de 1953), de SAT-Broŝurservo, F-47470 Beauville (sed kiu havas 11-paĝan enkondukon, klarigojn kaj glosojn de la trad.)

**Bahaismo kaj Esperanto** : Festlibro okaze de la 25-jariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo, kolekto, Frankfurt : BEL, 1997, 57 p.

**Soci-politikaj konceptoj de L.L. Zamenhof**, de B.A. Zozulja, eld. Verda Kukolo, 1997, 35 p.

**Vivo kaj la lasta parolado de la lasta profeto [Muhammad]** (B[enita de] A[llah]), tradukita de Allama Muztar Abbasi, Murree : Universala Islama Esperanto-Asocio, 1997, 12 p., dulingva.

**Tezoj pri la Islamo : ĉe la okazo de Trilanda Renkontiĝo**, 27-4-1997 en Akeno (D), de Allama Muztar Abbasi, Murree : UIEA, 1997, 12 p.

**La vera pano kaj la vera akvo de Vivo**, parolado (4-1-1968) de Sant Kirpal Singh, [tr. E. Marzola ?], [Milano : Homo-Centro, 1997], 6 p. (k vd 19 p. 29)

**Pluralogo**, de Vimala Devi, Thaumiers (F) : La Kancerkliniko, 1996, 80 p., 15 gld. (ĉ 150 poemoj.)

**Feliĉu, eblas !** de O. Mikhaël Aïvanhov, Fréjus : Eld. Prosveta (BP 12, F-83601), 1996, 28 p.

**Eposoj el antikva Ugarito** : *Baal kaj Anat, Krt, Aqht*, trad. el la ugarita de D. Broadribb, Bookleaf Publ. (59B Lukin St. Beverly WA 6304, Aŭstralio) 1995, korektita k reviziita eld. de 1971 (en *Biblia Revuo*), 46 p. (Tabuletoj skribitaj ĉ. 1500 a.K.)

**Paco en ŝtormo**, de Marc Rohrbach, havebla ĉe G. Tréanton, 25 rue de l'Eglise, F-22700 St Quay-Perros

**Ordo en ĥaoso : la Religia Kampteorio**, Jeremi Gishron, Jerusalem : Centro Sivron, 1994, 69 p.

**Perloj de l' Saĝo : el la skriboj de Bahá'u'lláh**, kompilita de Kambiz Pootschi kaj Peter Spiegel, Frankfurt : BEL, 1994, 56 p., ISBN 84-85238-88-5.

**Profetino Helena Konttinen** (1871-1916), de preposto K.K. Sarlin, tr. L Hanhiniemi, memeld. de la tr. (P.O. Box 764, Ingham, Queensland 4850 Aŭstralio), 1993 (senŝanĝa reeld. de 1977, + aldoneto 1996), 228 p.

**Antaŭ du mil jaroj...**, de F. Cândido Xavier, tr. L.C. Porto Carreiro Neto, Brasilia : Federação Espírita Brasileira, 1993 (2-a eld. reviz. de la tr.), 453 p.

**Bahaaj preĝoj**, Terrassa : Eld. Bahá'í, 1993, 69 p.

**La regado de la vivo**, eld. sub la egido de la Malnova kaj mistika ordeno de la rozkruco, 1993, 36 p.

**Notoj pri "Meditado, helpo al la vivado"**, Wellington (NZ) : Tutmonda Meditado- kaj Malstreĉado-Socio (PO BOX 11-276), 1992, 11+5 p.

**Skizo pri historio kaj evoluo de la religia vivo en Pollando**, [de Marek Krainki], 8 p.

**La Praevangelio laŭ Jakobo**, trad. Gerrit Berveling, Breda, Voĉoj Kristanaj, 1990, 16 p.

**Interveno ĉe la generado : etika vidpunkto**, de G.M.W.R. de Wert, tradukita de Gerrit Berveling, Breda : Voĉoj Kristanaj, 1990, 28 p.

**Celoj de LBV**, de Paiva Netto, trad. W. Francini, São Paulo : Legio de Bona Volo, 1990, 144 p.

**La Nova Realismo** : la konsekvo de la Nova Pensado, de Bruno Vogelmann, Antverpeno : F.E.L., 1989, 185 p., ISBN 90-71205-29-0.

**Tanniŝoo**, Noto lamentanta malsamon : La parolo de Sanktulo Ŝinran kaj la bedaŭro de Juien pri herezo, trad. Sasaki Kentoku, Kyoto : Intern. Ass. of Buddhist Culture, 1983, 25+22 p., dulingva

**Tiel diris la Majstro**, de H. Rohden, Rio de Janeiro : Spirita eld. Soc. F.V. Lorenz, 1978, 218 p.

**Tio okazis inter la jaroj 2.000 kaj 3.000**, de H. Rohden, Rio : Sp. eld. Soc. F.V. Lorenz, 1978, 38 p.

### Novaj religiaj gazetoj

**Nova Urbo** : Esperanta Novajletero de la **Fokolar-Movado**, n-ro 2 (dec. 1996). Plie, ĉiumonata komento "*Vorto de la Vivo*", de Chiara Lubich, estas petebla en Esp., de : Januŝ Sulzycki, 2 LeMoyne Place, Hamilton, Ont. L8J 1C1 Kanado.

**Letero el Taizé** : Unufoje Michel Basso tradukis n-ran kaj mem distribuis kun permeso el Taizé. Estas plano regule trad. : dumonataj 8 A4-paĝoj.

Tiu **ekumena** komunumo organizas ĉiujare renkontiĝon kun ĝis pli ol 100.000 partoprenantoj. Por pli facile akiri la konsenton de Taizé, necesas listo de **antaŭmendintaj abonantoj** (ĉ. 40 FRF, 14 DEM, 10.000 ITL : varias laŭ enspeznivelo de la lando). Reinhard Pflüger, Hermannstr. 3, D-60318 Frankfurt, Germanio (Tel. +49 69 5978467).